

(EN ESPERANTO)

ISSN 0032-4361

6


1996

中國新道

EL POPOLA

CINIO





Banjano

Foto de LIU SIGONG

INTER NI

Ni jam aperigis en tiu ĉi rubriko iujn opiniojn kaj proponojn de niaj legantoj pri artikoloj, fotoj k.a. de nia revuo. Ĉi-sube estas rimarkigoj pri lingvaĵo, prezentitaj de niaj legantoj. Multaj el ĉi tiuj kun granda atento legis nian revuon, donis opiniojn pri vortfarado kaj eĉ montris preserarojn en nia revuo. Tio tre helpas al ni plibonigi nian laboron. Pro tio ni kore dankas ilin.

La Red.

Mi ankaŭ ŝatas la artikolon "Historio de ĉinaj kostumoj". Laŭ mi estas prefere diri: "ĉinaj tradiciaj vestaĵoj" ol "ĉinaj kostumoj".

ZORKA ENIZAN
(Francio)

Mi proponas, ke en la rubriko "Por komencantoj"

oni evitu neologismojn: olda, trista k.s., sed uzu "maljuna", "malĝoja".

NEĈAJE NIKOLAO
(Rusio)

Jen kelkaj lingvaj rimarkoj. Oni ne diras "monta pejzaĝo", sed "montara" (paĝo 6 en la 8-a linio de supre, dekstra kolumno, 10-a numero 1992). Laŭ mi ankaŭ la vorto PLANIZA estas ne bone uzita, devus esti PLANADO (sur paĝo 7).

MILA VAN DER HORST-KOLINSKA (Nederlando)

Al mi ne plaĉas, ke vi kelkfoje uzas la vortojn "infaneco", "antikveco" en la sencoj "infanaĝo", "antikva tempo". Laŭ mia opinio, tiuj vortoj (infaneco, antikveco) havas nur la sencojn de kvalito.


GENNADIJ TURKOV
(Rusio)

ENHAVO

- 2 *INTERNI*
- 4 En la geknaba palaco
- 7 Prago bonvenigas vin
- 8 *ĈINAJ E-ISTOJ:*
Esperanta Kamelo Li Ren
- 11 *ESP-NOVAĴOJ*
- 12 *ORIGINALE VERKITAJ:*
Puno; Kiam; Letero al ĉinaj
gesamideanoj; Falas neĝeretoj
- 14 Bonvenon al EPĈ-kunsido dum la
81-a UK
- 16 *POR KOMENCANTOJ:*
Testudo
- 17 La tero avertas...
- 18 Florkulturisto Li Hongru
- 21 Trajno ekveturis el la Pekina
Okcidenta Stacidomo
- 25 *NUNTEMPA BELARTO:*
Koloraj "Rebusoj"
- 28 *LAŬ LA SILKA VOJO:*
Vojaĝo al Maiji-monto
- 35 *MULTNACIA ĈINIO:*
Nacio de transloĝiĝo
- 37 Vojaĝo en Xinjiang
- 38 Dum la tagoj en Arkto
- 40 Batalo kontraŭ pornografia veneno
- 42 Insektoj — manĝaĵoj en la estonteco
- 43 Felo inkrustita per perlaj larmoj
(Popolrakonto)
- 44 *KURANTAJ AFEROJ*
- 46 *VIRINOJ KAJ INFANOJ:*
"Patrino de la ĉinaj provtubaj beboj"
- 48 *POR VIA SANO:*
Masaĝo en la ĉiutaga vivo (XI)
- 49 Pri la transskribo de ĉinaj personaj
kaj lokaj nomoj
- 50 *GALERIO:*
Pentraĵo "Ĉevaloj"
SUR LA KOVRILO:
En infanĝardeno
Foto de Liu Sigong
- 2 Banjano
SUR LA DORSKOVRILO:
La Granda Muro en nokto

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Pekino (p. 21)
2. Kantono (p. 40)
3. Guizhou-provinco (p. 35)
4. Qingzhou (p. 18)



En la geknaba palaco

KNABINETO Xiao Xiao (Ŝjaŭ Ŝjaŭ) gaje ridis, ĉar ŝi denove staris en la danca klasĉambro de la Geknaba Palaco. Tie funkciis 280 kursoj, kiuj altiris infanojn kun diversaj hobiaj. Ili ĉiuj estis gajaj kiel Xiao Xiao, ĉu ili lernis danci, pentri aŭ ŝakludi, ĉu ili lernis dramaturgion, fremdan lingvon, komputeron aŭ tablotenison. Kredeble, la antikva konstruaĵo el ruĝaj brikoj kaj flavaj tegoloj estas la plej vicleplena loko en Pekino. Ĝi situas en Jingshan(Ĝingŝan)-parko de Pekino, iama imperiestra ĝardeno. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949 ĝi fariĝis la plej granda geknaba palaco en Pekino.

Uŝu-ekzercado

NAIVECO DE INFANOJ

La programo de lernobjektoj en la Geknaba Palaco estas diferenca de tiu en lernejo, aŭ oni povas diri, ke ĝi estas kompletigo de la lasta. La Geknaba Palaco alte taksas kulturadon de la individueco kaj intereso de infanoj. En la lernejo la infanoj lernas samajn objektojn, sed en la palaco ili libere elektas lernobjektojn, ke ili havas pli da ŝancoj montri sian naivecon.

Foje mi venis al la palaco kaj vidis, ke sur ĝia korbopilka ludkampo iras intensa konkurso. "Ĉu vi ŝatas ludi korbopilkon?" mi demandis malgrandajn korbopilkojn ekster la kampo. "Treege!" diris knabeto kun nazpinto ruĝa de frosto, opiniante, ke sole



“ŝati” ne sufiĉas por esprimi ilian fanatikecon. “Ĉu vi fariĝos membroj de la ĉinaj teamoj estonte?” “Ni superos la nunajn.” Evidente, tiuj malgrandaj fanatikuloj estas nekontentaj, ke la Ĉina Vira Korbopilka Teamo ne gajnis la mondĉampionecon.

Infanoj, eĉ tre malgrandaj, havas revon. La 6-jara Zhou Zhou (Ĝoŭ Ĝoŭ) kun hartufo sur la postkranio lernas en prezent-kurso. Nun li estis faranta modvestan prezentadon. Dum prezentado lia pantalono falis, tamen li ankoraŭ serioze marŝis. Lia patrino informis, ke ŝia filo revas esti filmostelo.

La infanoj, ŝatantaj *uŝu-on*, estis sin ekzercantaj. “Unu.” “He.” “Du.” “He.” La instruisto donis komandvorton kaj la infanoj, eĉ kvietaj knabinetoj, tuj plenvoĉe respondis. Nur la plej juna knabeto en parado ekpaŝis per la maldekstra piedo kaj samtempe svingis la maldekstran brakon. Tio ridigis min. La instruisto, svingante la manon, sin pravigis: “Li estas novveninto.”

Instruistoj estas patronoj de la naivaj infanoj. Ili donas al la lastaj memfidon kaj ankaŭ ĝojon. Instruisto Xiao eksplikis la ĉefan enhavon en drametoludo: verajn aŭskultadon, rigardadon kaj sentadon. Li atentigis: “Aŭskultu, en la ĉambro kuras muso. Kie ĝi estas?” La instruisto metis siajn manojn ĉe la orelojn por aŭskulti. La infanoj ekridis: “Ne!” “Kial ne?” “Nefidele!” “Jes, oni ‘aŭskultas’ per ‘okuloj’. Antaŭ ol trovi la sonon, oni rigardadas disen. Kiam oni estas trovinta la sonon, oni koncentras sian rigardon al ĝi. Aŭskultu, la muso estas sub la piano...”

“Tre interese!” diris la infanoj. Kaj la instruisto tiel donis la sciojn al ili.

KULTURI AMON

Ĝojo apartenas al infanoj. La Geknaba Palaco estas loko, kie la infanoj lernas sciojn kaj montras sian talenton post streĉa lernado. Tamen la instruistoj de la palaco neniam forgesas kulturi amon en la infanoj, opiniante ĝin plej grava.

Instruistino Zhang Xianmin (Ĝang Ŝjanmin) faris al la danco-kursanoj “naturecan trejnadon”. “Ĉu vi ĝojas, kiam via patrino donis al vi la plej ŝatatan donacon en la Nova Jaro?” “Jes.” “Bone, do montru vian ĝojon.” La infanoj ekridis. “Ne estu tro ĝenataj, ridu plenvoĉe.” La infanoj ekridis denove. “Ne, ridu elkore, nature kaj malstreĉe. Ridu senbride.” La infanoj ridadis pli kaj pli serene, vivece kaj profunde. “Ha, kiel bone... Haltu.” Ĉe tio diversaj ridoj fiksigiĝis sur la vizaĝo por momento. “Tre bone. Levigu kaj frapu vian ‘maljunan talion’.” La infanoj reridis.

Dum la “natureca trejnado” instruistino Zhang turnis sian atenton ankaŭ al disvolvo de kreivo de la infanoj. Ŝi diris: “Ne ili ĉiuj fariĝu dancistinoj, tamen kun kreivo ili kapablos fari ĉion en la 21-a jc.”

Disvolvi la naturan belecon ne signifas fari ĉion

senbride. Instruistino Zhang neniam indulgis la knabinetojn dorlotatajn de siaj gepatroj. Kelkiam ŝi severe kritikis ilin: “Ne decas paroli sen ĝentileco.” “Ne kuntiru viajn brovojn! Tio ne estas bela.” Ŝi postulis, ke la dancistinetoj estu okulplaĉaj de la kapo ĝis la piedoj. La gepatroj de la infanoj gaste ĉeestis la kurson, kio multe edifis ilin.

“Necesas doni al la infanoj tion, de kio ili profitos en la tuta vivo, kaj plej grave estas instrui ilin, kiaj homoj ili fariĝos,” diris la instruistino pri voĉmuziko. En tiu flanko la amo de la instruistino pli profundas. Ĉar la gepatroj, kiuj deziregis, ke iliaj infanoj pli frue fariĝu kompetentuloj, eĉ/ ne pensis, ĉu la solinfanoj havos veran ĝojon, se estos nur konkurso, sed ne amo en la estonta socio.

Iu patro diris, ke lia filino eklernis deklamon en la aĝo de kvar kaj duona jaroj en la palaco. Ŝi ne nur gajnis titolon “Reĝo de rakontistoj”, specialan premion en rakonta konkurso, sed ankaŭ scipovis prizorgi aliajn. Foje, ŝi trovis la instruiston laca, ŝi iris porti akvon por li. Post longe ŝi revenis kaj diris al li: “La akvo estis varmega kaj mi blovis ĝin ĝis malvarmetiĝo.”

Ili progresis, ĉar ili komprenis ami tiujn, kiuj ilin amis. Ĉu la infanoj povas doni amon al la malfeliĉaj nekonatoj? Instruistoj verkis la drameton “Infanoj ne povantaj plu viziti lernejon” kaj la dancon “Ruĝaj folioj sur Xiangshan (Ŝjangŝan)-monto” por kriplaj infanoj. La infanoj eksciis, ke en Ĉinio multe da infanoj ankoraŭ ne povas viziti lernejon pro malriĉeco aŭ kripleco. Sekve ili donacis siajn skribilojn, kajerojn kaj poŝmonon por helpi infanojn malriĉajn aŭ kriplajn.

POR SIA HEJMLOKO

“La media problemoj jam minacas la vivon de la homaro, oni devas senprokraste alpreni rimedojn protekti la medion,” diris instruistino Zhu Jiang (Ĝu Ĝjang), reveninte kun mediprotektaj kursanoj post enketo pri la pekina trafiko. Ŝi daŭrigis: “Poluado de aŭtoj per ellasitaj gaso kaj bruo estas tre serioza. La enketo povas altigi la median koncepton de la infanoj.”

La mediprotekta kurso fondiĝis lastjare. Neatendite, ĝi altiris multajn infanojn. Instruistino Zhu Jiang diris: “Estas necese konigi al la infanoj, kia estis la origina fizionomio de la tero, kial ĝi fariĝis, kia ĝi estas nun, kaj kion ni faros al ĝi.” Sekve, ŝi gvidis la infanojn surgrimpi la pinton de Jingshan-monto por observi la aeron de Pekino. El tio ili sciigiĝis, kial “fumnebula akcidento” en iuj urboj de la mondo mortigis milojn da homoj kaj kial en ĝi pereas specio de estaĵo en ĉiu 30-a minuto.

La infanoj, kiuj konas la median krizon, estas aparte sentemaj al la mediprotekto. Hejme, ili atentigis al sia patrino: “Fermu bone la kranon!” kaj al sia patro: “Ne plu fumu. Tio difektas vian sanon kaj

poluas la medion.” Post nelonge iu patrino venis informi al la instruistino: “Averto de la infano bone efikis, ke lia patro ne plu fumas.”

Lastjare la infanoj de la mediprotekta kurso partoprenis en la somera tendumo organizita de la Geknaba Palaco. Trovante infanojn de la biologia kurso kolektantaj specimenojn, ili ege bedaŭris. “Hej, ne pluku florojn!” “Instruistino, vidu, ili plukis multajn florojn sur la monto.” La somera tendumo finiĝis kaj la infanoj de la mediprotekta kurso memvole purigis la monton kune kun la instruistino.

Foje, knabo Wu Wei kun siaj kunlernantoj ekskursis. Kiam li trovis, ke la vidindejo estas nepura kaj ĉirkaŭe ne estas rubujoj, li enmetis diversajn forĵetaĵojn en sian librosakon kaj revenis kunportante ilin. Li diris al siaj kunlernantoj, ke plastaj sakoj, serioze poluantaj, ne putriĝos eĉ post cent jaroj. Oni povas vidi en satelita foto tro da rubo ekster Pekino...

La tero estas la unika hejmo de la homaro. Se la hejmo pereus, por kio ni klopodus hodiaŭ? Nun la infanoj bone komprenas, ke ili devas ami sian hejmon.

GAJO NE NUR POR INFANOJ

Multaj infanoj, kiuj vizitis la Geknaban Palacon nur en postlecionaj horoj aŭ ferioj, fariĝis talentuloj. Iuj artistoj, kiuj lernis kanti kaj danci en la Geknaba Palaco en la 50-aj jaroj, klare memoras sian infancon. Tamen tia gajeco ne apartenas nur al la infanoj. Se vi tie restos por kelka tempo, ankaŭ vi facile sentos la profundan amon inter la instruistoj kaj infanoj.

Zhang Le baldaŭ flugos al alia lando por studo. Ŝi lernis pentradon en la palaco en sia infaneco. Hodiaŭ ŝi revenis por esti modelo unufoje por la lernantoj kaj por akompani la instruistinon. Raportisto de televida stacio direktis sian videoregistratoron al pentranta knabino kun serioza mieno kaj demandis: “Kiel vi pasigos la vintrajn feriojn?” “Pentri.” “En kiuj landoj eksponiĝis viaj pentraĵoj?” “Hm... mi forgesis.” Ĉe tio la instruistino ridis.

Antaŭ la Scienc-teknika Halo mi demandis iun knabon de aviadil-modela grupo: “Ĉu la lernado en la palaco pli ŝarĝis vin?” Mi trovis, ke liaj okulvitroj estas tre grandaj. “Onjo, mi por min malstreĉi!” Li elprenis el sia librosako aŭtomatan vetkuran aŭton: “Ĝin muntis mi mem. La konkurso komenciĝos post kiam la instruisto venos.” Momenton poste, la mezaĝa instruisto venis. La knabo gaje alkuris al li, dirante: “Ha, instruisto, kiel maltrankvile mi vin atendis!” Kaj la instruisto faris al li grimacon.

Kiam finiĝis la leciono, jam vesperiĝis. Malgrandaj ludantoj de pekina opero estis forigantaj ŝminkon kaj demetantaj aktoran kostumon. Subite aŭdiĝis: “Hej, knabeto!” La knabeto, kaŝante sin post

sia patrino, ludis kaŝludon kun la instruisto kaj ridante diris adiaŭ al li. “Tiuj 6-7-jaraj infanoj ĉiuj turneis en sudorient-aziaj landoj. Mi tre ĝojas pro ilia progreso.” “Kaj laŭdindas via penemo,” mi aldonis. “Pli laŭdindaj estas iliaj gepatroj, kiuj laboras tage kaj venas tien vespere sen manĝi.” Vere, nemalmultaj malgrandaj infanoj iras al kaj revenas de la palaco en akompano de siaj gepatroj. Ĝus mi vidis iun patron dormetanta de laco en akordionejo.

Preterirante la piedpilkon ludkampon, mi rememoris trejniston Zhang, kiu sentis sin gaja kune kun la infanoj. Li diris al mi: “Mi koleris kontraŭ la patrino de Wei kaj diris al ŝi, kial ŝi eksedziniĝis kun la edzo, ne multe pensinte pri la infano... Se ne okazus la familia malfeliĉo, Wei povus fariĝi talenta piedpilkisto. Sed nun li foriris kun sia patrino por ĉiam... Ve, kiel bona knabo!”

En la nokto mi kvazaŭ denove aŭdis veadon de la trejnisto. Tiam aro da infanoj, kiuj ĝus finis lecionon, paŝis preter mi. Ilia ridado rompita la noktan kvieton kaj mia koro multe faciliĝis. ■

Membroj de la aviadil-modela grupo



Instruistino kaj lernantino



HAN WEN:

PRAGO BONVENIGAS VIN



La Preĝejo de Sankta Nikolao

EN 1921 okazis la 13-a UK kun 2 561 partoprenantoj en Prago, la ĉefurbo de la trijara Ĉeĥoslovakio. 75 jarojn poste, t.e., inter la 20-a kaj 27-a de julio 1996 okazos la 81-a UK en ĝi, la ĉefurbo de la Ĉeĥa Respubliko, fondita komence de 1993 post la dismembrigo de Ĉeĥoslovakio.

Prago kun longa historio kaj bela pejzaĝo situas sur sep montetoj en la koro de la eŭropa kontinento. Ĝin trakuras la rivero Vultavo, grava komerca vojo inter la suda kaj norda Eŭropo. Dum la pasinta jarmilo okazis en Prago multaj politikaj konfliktoj, ekonomia rivalado, militaj aktivadoj, religia malpaco kaj ideologia kontraŭstaro, kiuj destinis al ĝi ŝanĝi sian aspekton plurfoje. De la antaŭkristana ĝis la moderna epoko, ferocaj invadoj de fremdaj armeoj kaj detruo fare de superakvegoj kaj epidemioj alternis kun periodoj de ekonomia prospero kaj kultura progreso. La kulturo, kiu floris iam en Prago, estas plej bone atestata de la urba arkitekturo. Pli ol 130 preĝejoj kaj aliaj ekleziaj konstruaĵoj formas la ĉeftrezoron de Prago, tenere konata kiel la “patrino de urboj”.

Arkeologia esplorado rivelas la ekziston de la unuaj religiaj kultejoj en la 9-a kaj 10-a jarcentoj. Inter la 12-a kaj 13-a jarcentoj Prago estis jam bela romanika urbo kaj komence de la gotika periodo (en la unua duono de la 13-a jarcento) ĝi disvolviĝis en unu el la plej vastaj kaj dense loĝataj urboj de Eŭropo (preskaŭ duoble pli granda ol la samtempa Parizo). La rotondoj, preĝejoj, sinagogoj kaj monaĥejoj estas elokventa ŝtona kompendio de la pasinteco de la urbo.

En la 14-a jarcento la kosmopolita Reĝo de Bohemio kaj Sankta-Romia Imperiestro Karlo IV prenis Pragon kiel la ĉefurbon kaj faris ĝin la politika kaj kultura centro de Eŭropo. En mallonga periodo ekestiĝis la Nova Urbo. Ŝtona ponto kunligis la du bordojn de la rivero Vultavo kaj ĉe ambaŭ

bordoj leviĝis arkitekturaj dominaĵoj: la katedralo de Sankta Vitus, la baziliko de Sankta Petro kaj Sankta Paŭlo, la preĝejo de Karlo la Granda, la Emauso-monaĥejo Na Slovanech kaj aliaj imponaj ekleziaj konstruaĵoj. La plej spertaj en- kaj eksterlandaj arkitektoj kaj majstro-masonistoj estis invititaj al Prago por labori laŭ reĝaj komisioj.

La negativaj reagoj de la loka loĝantaro al la pompa riĉo kaj senbrida potenco de la eklezio dum la dekadencperiodo post la morto de Karlo IV fariĝis movado por religia reformado. Poste eksplodis la Tridekjara Milito kaj dekadencis Prago. En la 17-a jarcento inaŭguriĝis la epoko de nova, pompa arkitektura stilo — la baroka. Prago denove abundis je la plej bonaj arkitektoj de la epoko. Kaj la preĝejoj de Sankta Nikolao, Sankta Jakobo kaj Sankta Klemento kaj la preĝejo Loreto rangas inter la plej bonaj ekzemploj de baroka preĝeja arkitekturo en Prago.

Nun Prago havas pli ol 1.2 milionojn da loĝantoj kaj 1 700 memorigajn konstruaĵojn. En la urbo estas multaj parkoj, ĝardenoj kaj sportaj-kulturaj instalaĵoj. Tie arbore staras pagodoj, kiuj honorigas la urbon per la nomo “Urbo de Cent Pagodoj”.

Jam en la 14-a jarcento estis starigita en la urbo la unua universitato de meza Eŭropo. En la urbo lekiis famaj sciencistoj Tycho Brahe, Johannes Keple kaj Albert Einstein. Ĉiujare en ĝi okazas la Koncerto de Praga Printempo. Ankaŭ pragaj dramoj, muzeoj kaj belartaj domoj ĝuas renomon.

La 81-a UK inaŭguriĝos en la Kultura Centro (Konferenca Centro) kun la kongrestemo “Kulturo: Valoro aŭ Varo”. Antaŭ, en kaj post la kongreso estos tuttaga, duontaga kaj nokta turismadoj en la urbo kaj aliaj pitoreskejoj de Ĉeĥio.

Samtempe kun la kongreso okazos la infana kongreseto ĉe la bordo de lago 51 km sude de la urbo. ■



S-ro Li Ren

ĈINAJ E-ISTOJ

Esperanta Kamelo Li Ren

de SUN AIJUN

SEPTEMBRE de 1995 mi partoprenis la 3-an Ĉinan Kongreson de Esperanto okazintan en Chongqing (Ĉongĉing), Sichuan-provinco. Ĉiutage en la kongresejo mi renkontiĝis kun maljunulo en okulvitroj, altastatura, grizhara kaj afabla. Poste, mi informiĝis, ke li estas s-ro Li Ren (Li Ĵen), prezidanto de la Chongqing-a E-Asocio. En

la lastaj tri tagoj de la kongreso mi havis la ŝancon konversacii kun li.

“Kalo estas mia Esperanta nomo,” diris s-ro Li. “En 1947, kiam mi lernis en la E-grupo de Sichuan-universitato, mia instruisto Eltunko donis al mi la nomon por kuraĝigi min diligente lerni. Poste, mi anstataŭigis la nomon per ‘Kamelo’, ĉar mi ŝatis la eltenemon de ka-

melo kaj per tio mi intencis kuraĝigi min por plua penado. Sinjoro Eltunko laŭdis min kaj ŝerce demandis: ‘Kiom da ĝiboj vi havas?’ En 1949 li oferis sian vivon por la liberiga afero de la ĉina popolo. Tamen, la idealo de la esperantistoj por paco enradikiĝis en mia koro.”

“Krom Eltunko, ankaŭ sinjoro Tao Xingzhi (Taŭ Ŝingĝi), fama edukisto de Ĉinio, forte influis min,” diris s-ro Li. En 1944 li eklernis en la literatura grupo de Yucai-lernejo fondita de s-ro Tao en Chongqing. S-ro Tao alte taksis edukadon al lernantoj en moralo, intelekto kaj fizikkulturo. Li kulturis spiriton de unuigo, progreso, peno kaj modestemo en la lernejo. Li partoprenis ankaŭ en la kontraŭjapana nacisava movado de Ĉinio. Influate de li, Li Ren firmigis sian volon esti instruisto. En 1948 la 20-jara Li Ren komencis instruadon. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio li laboris kiel respondeculo en agrikultura lernejo, mezlernejo, normala lernejo kaj eduka instituto de la urbo.

“De 1953 ĝis 1963 mi laboris en la 25-a Mezlernejo de Chongqing. Tiuj dek jaroj estis ora periodo de la lernejo.” S-ro Li dronis en rememoro pri la pasinteco.

En la mezlernejo, kiel la unua lernejestro, Li Ren gvidis kelkdek instruistojn en praktikado de la eduka teorio de s-ro Tao Xingzhi. Li ofte direktis preparadon de lecionoj kaj kun siaj kolegoj vizitis aliajn lernejojn por interŝanĝi spertojn en instruado. Li faris demonstran instruadon kaj aranĝis diversajn postlecionajn aktivadojn, ekzemple, murgazetan konkurson, legadon kaj faradon de instruaj helpiloj.

En 1958 s-ro Li Ren okazigis Esperantan ekspozicion en la

lernejo. Estis eksponataj leteroj de li kaj liaj esperantistaj amikoj de Ĉeĥoslovakio, Sovetunio kaj Pollando, kaj ankaŭ ekzercoj kaj metiartaĵoj de alilandaj lernantoj. Post tiam lia E-kurso pli kaj pli vigligis kaj nemalmultaj lernantoj korespondis kun alilandaj samideanoj.

Post la kongreso mi ofte rememoris la afablan vizaĝon de s-ro Li Ren kaj liajn vortojn: "Akompanante min de 50 jaroj, Esperanto plilarĝigis mian vidkampon, pliriĉigis mian vivon


kaj progresigis mian edukadon. Mi amas Esperanton kaj mi volontas dediĉi mian energion al E-movado."


Li Ren starigis E-kurson en la lernejoj, kie li laboris. En 1980 fondiĝis la Chongqing-a E-Asocio kaj li estis elektita kiel ĝia prezidanto. Li ne nur redaktis Esperantajn gazetojn kaj kompilis Esperantajn librojn, sed ankaŭ okazigis Esperantajn korespond- kaj radiokursojn. Rezulte de tio, multe progresis la Esperanta movado en

Chongqing. En 1988 li emeritiĝis el la Chongqing-a Normala Instituto. En 1993, nome de la Chongqing-a E-Asocio s-ro Li Ren fondis la Chongqing-an Fremdlingvan Lernejon Shitao kaj funkciigis en ĝi kursojn de Esperanto kaj la angla lingvo.

S-ro Li Ren laboris sur Esperanta kampo pli ol 40 jarojn. Antaŭ nelonge ĉe lia 68-jariĝo mi sendis al li salutkarton por lia plua sukceso. ■

S-ro Li Ren kaj liaj lernantoj





S-ro Li Ren (maldekstre) en la Tria Ĉina Kongreso de Esperanto



S-ro Li Ren kaj lia edzino

S-ro Li Ren helpas gejunulojn en lernado de Esperanto.



ESP-NOVAJOJ

● La 3-an de februaro 1996 la Liuzhou(Liūgōu)-a E-Asocio de la Guangxi(Guāngxi)-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono okazigis kunvenon por festi sian 10-jariĝon. Samtempe okazis ankaŭ ceremonio por la unuataga distribuo de "Turismo de Liuzhou", la unua Esperanta eldonaĵo kaj turisma gvidlibro de Guangxi. Ĝi diskonigas Esperanton kaj helpas disvolviĝon de turismo en la meza kaj okcidenta partoj de Guangxi.

(Zhou Hongde)

● S-ro Io Chou, profesoro de la Nordokcidenta Agronomia Instituto de Shaanxi(Ŝenŝi)-provinco, estas fama entomologo kaj esperantisto. La popola registaro de lia hejmgubernio Yinxian de Ningbo, Zhejiang(Ĝeĝjang)-provinco, investis pli ol 2 milionojn da juanoj por konstruado de la Insekta Muzeo de Io Chou, kie oni konigos lian vivon kaj eksponos liajn sciencajn verkojn kaj pli ol 4 000 specimenojn de insektoj kolektitaj de li dum la pasintaj 50 jaroj. En la muzeo oni prezentos tiun insektan mondon en Esperanto, en la ĉina kaj angla lingvoj. Nun finiĝis konstruado de la ĉefa parto de la muzeo kaj oni finarango la eksponaĵojn antaŭ la fino de la jaro. La muzeo malfermiĝos printempe de la venonta jaro.

● LKK de la Unua Azia Kongreso de Esperanto en Ŝanhajo informis, ke ĝis la komenco de marto pli ol 200 ĉinaj kaj alilandaj esperantistoj sin anoncis por la kongreso. El ili 100 estas el Japanio, 50 el Ĉinio, 40 el Koreio kaj pli ol 10 el aliaj aziaj landoj. (Wang Jianbing)

● La 21-an de marto 1996 okazis en Pekino kunveno por festi la 45-jariĝon de la Ĉina E-Ligo. Ĝin ĉeestis pli ol 70 pekinaj esperantistoj. (Wang Jianbing)

● Antaŭ nelonge aperis la libro "Verda Reto 1996". Ĝi, en la ĉina lingvo kaj Esperanto, konigas pli ol 130 ĉinajn esperantistojn, 20 lokajn E-organizaĵojn kaj E-eldonaĵojn. Ĝi prezentas iujn in-

ternaciajn fakajn E-organizaĵojn. Al la libro aldoniĝis ankaŭ indekso de nomoj de personoj kaj skemaj mapoj. Kun tiu libro alilandaj esperantistoj, kiuj vojaĝas en Ĉinio, facile trovos helpantojn en kiu ajn loko. La libro, en formato tridekduon-folia kaj kun 60 pĝ., estis kompilita de Liu Xiaozhe. Adr.: Wang Tianyi, Xi'an-a E-Asocio, n-ro 74 Xiyang Lu, Xi'an, Shaanxi CN-710054, Ĉinio (Liu Xiaozhe)

● Kadre de la Budapeŝta Zamenhof-festo en la 16-a de decembro 1995, prezentiĝis memora arta programo por festi la kontinuan 23-jaran ekziston de la revuo "Juna Amiko" en la hungara ĉefurbo. La revuo aperis ekde novembro 1972 sub la redaktado de s-ro Geza Kurucz dum 9 jaroj, de s-ro Oldrich Knichal dum 5 jaroj kaj de Stefan MacGill dum 9 jaroj. La pli ol 100 partoprenantoj aŭdis, ke la revuo eniras 85 landojn kun 1 140 abonantoj kaj pli ol 300 pliaj ricevantoj. Ne-abonanto de la revuo rajtas peti senpagan specimeno de: Juna Amiko, p.f. 193, H-1368 Budapest, Hungario.

(Juna Amiko)



Dancamantoj de E-kurso funkciigata de la E-Asocio Oradea

● Por refreŝigi kaj multigi la membrojn de Esperanto Asocio Oradea, ĝia prezidanto Irene Szucs proponis al gejunuloj kaj dancamantoj lerni Esperanton, kontakti aliajn grupojn en la mondo kaj

partopreni diversajn konkursojn kaj festivalojn kun dancoj, popolkantoj kaj muziko. Proponojn sendu al: Esperanto Asocio Oradea, C.P. 1-183, 3700 Oradea, Rumano. (Irene Szucs)

● Je la fino de novembro 1995 okazis la jara asembleo de la Venezuelana Esperanto-Asocio. La ĝenerala sekretario J.E. Bachrich informis la ĉeestantojn pri la laboro farita dum la jaro, la atingoj kaj malatingoj, kaj ankaŭ raportis pri la 80-a UK en Tampere. Prof. Fernando De Diego prelegis pri "Esperanto kiel ideologio kaj socia fenomeno". (J.E. Bachrich)

● "Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj" fondita en 1951 posedas la kastelon Gresillon kun 18-hektara parko. Ili organizas aŭ gastigas kursojn diversgradajn, prelegojn diverstemajn, distraĵojn diverspecajn kaj ekskursojn en belega regiono. Ĝi disponigas al la restadantoj kurso-ĉambrojn, riĉan bibliotekon, riĉan libro-servon kaj butikon. Jam vizitis ĝin miloj da gesamideanoj. Adreso: Kastelo Gresillon, F-49150 Bauge, Francio. (B. Chéverry)

● Post sia fondiĝo en dec. 1978 Pakistana Esperanto-Asocio nun havas pli ol 200 anojn kaj eldonis en Esperanto ĉirkaŭ 30 diverstemajn librojn, vortarojn kaj broŝurojn. En 10 urboj aktivaj grupoj laboras por la Esperanto-movado. Se pli ol 5 personoj volas lerni la lingvon, loka grupo aranĝas Esperantan kurson. La asocio aranĝas du landajn kongresojn dum la jaro.

(A Butt)



En la 18-a Somera Kongreso de Esperanto en Pakistano



S-ro Carmel Mallia

ORIGINALE VERKITAJ

Puno

(Prozaĵo)

de CARMEL MALLIA*(Malto)

ESTIS profunda nokto. Profunda ne pro la tempo, ĉar estis ankoraŭ la sepa vespere, sed ĉar por la popolo de la vilaĝo Qormi la suno jam malaperis antaŭ tagoj kaj tagoj.

Estis vintro. La stratoj mallumaj. Kial mallumaj? Unue ĉar tiunokte tute mankis la elektra lumo. La popolo estis tiel malriĉa! La ŝtato estis tiel malriĉa!

Estis militotempo! La jaro 1940. Sed speciale la stratoj estis ankoraŭ mallumaj, por ke la germanaj aviadistoj ne rekonu la bombardindajn lokojn. La insulo ne estas granda. Eksterlandano, kiu interalie ne vizitis Malton, iam diris, ke la vilaĝanoj dormas kun la piedoj en la maro. Ŝerco malica!

Tiuvespere, la familio Agius manĝis kune, krom unu, belvizaĝa anĝelo, dekjaraĝulo, kiu dume troviĝis en la paroĥa preĝejo. Grandega

preĝejo, kiun la antaŭuloj konstruis popece po-jare per sia propra mono. Tio ne signifis, ke ili estis riĉuloj. Kiel kamparanoj aŭ memlaboruloj, ili manĝis kion ili gajnis; sed por ili la religio valoris multe pli ol alia afero monda, pli ol la familio mem. Nu jen grandega preĝejo, oni povas libere nomi ĝin katedralo, preskaŭ malluma. Nur du kandeloj sur la ĉefa altaro prilumis la malvarman ĉirkaŭon. Antaŭ ĉi tiu altaro surgenuiĝis dek altar-servistoj, ĉiuj junaĝaj, tremantaj pro la malvarmo, tremantaj pro tio, ke ili estis tute solaj ĉirkaŭitaj de ŝanceliĝantaj kolonoj kaj balbutantaj bildegoj, iam pentritaj de konataj kaj nekonataj pentristoj, kies skeletoj jam putriĝis kaj pulvoriĝis.

De tempo al tempo, jen unu jen alia en la grupo alparolis la apudestanton per subpremata voĉo. Kial ili troviĝis tie? Kial? Ĉu la paroĥestro punis ilin tiel stulte kaj tiel nekonscience? Tiel superule? Tiel malkaritate? Eble blufe aŭ kaprice! Unu el la dek genuantoj sciis, ke nur li kulpis. Pro li la aliaj estis kunkulpuloj, sed fakte senkulpuloj. Nur unu estis la malobeema, kaj en sia intimo sciis, ke la aliaj portas lian krucon.

Kiom da tempo ili devis resti en tiu malbenata loko?! Kristo elsupre de sia kruco meze de la altaro rigardis ilin silente, kvazaŭ minace. La de-temp-al-tempa sonorila tintado ekskuis ilian fragilan korpon dormeman sed interne dolorĝemantan, soifantan al la ekstera mallumo, kiu eble forviŝos ĉi tiun ŝajne eternan momenton. La gepatroj Agius tremetadis demandante al si, ke ili estis tiom severaj kun sia filo. Jes, severaj, eĉ se ili ne estis la punantoj. Ili sentis sin kunkulpuloj. La panopeco, nesufiĉa en tiu milita tempo, kvazaŭ ekalĝuiĝis al la palato. Subite, granda bruoj! Post la bruoj, morta silento! Post la silento, krio, alia krio, ĝemado...! La tuta vilaĝo ekstremis kaj priploris la detruitajn domojn, malbenante la senkorajn malamikajn bombojn.

Kiam

(Poemo)

de CARMEL MALLIA (Malto)

*Kiam la horojn dubvualas
difterie varmaj rememoroj,
kiam panee kandelmienas pensoj
post furoraj debatoj,*

*ne demandu kial.
La naturo veras
dum vi eble eĉ nescie kleras.*

*Kiam la interondaj kisoj
monahin-meditemas,
kiam ŝvelige bolas la vojovejnoj
per ĉiusekunda vermuto acida,
ne demandu kial.
La naturo veras
dum vi eble eĉ nescie kleras.*

*Kiam la nomoj perdiĝe miksiĝas
kadavre-dense,
kiam dum letargie magia oldeco
grincas rekvieme la osto,
ne demandu kial.
La naturo veras
dum vi eble eĉ nescie kleras.*

*Kiam adamas eva
kaj evaas adamo,
kiam ĉecerbe parakletas
pasiaj perloj,
kiam la plumo konscias
pri sia libero sklaveca,
ne demandu kial.
La naturo sinceras
dum vi eble eĉ nescie
vian perplekson parkeras.*

*Prezidanto de la Malta Esperanto-Societo; membro-fondinto de Esperantista Verkista Asocio; verkinto de pluraj maltlingvaj artikoloj, en maltaj gazetoj, pri la franca literaturo kaj Esperanto.

Letero al ĉinaj gesamideanoj

(Poemo)

de ADAM PAVLUKOVEC (Belorusio)

*Ho karaj ĉinaj gesamideanoj!
Al vi deziras mi en Nova Jar':
Efektiviĝu ĉiuj viaj planoj,
Vin pliriĉigu sorto sen avar'*

*Kaj per sinceraj bonaj geamikoj,
Kaj per kunbatalantoj laŭ bezon'*

*Kaj per ĉefverkoj novaj kaj klasikaj,
Kaj per sufiĉa por la vivo mon'.*

*Prosperu via bela land' ĉinia,
Por estu riĉa ĉiu via dom',
Por kresku ĉiam amikeco nia
Simile al ĝardeno la legom'.*

*Prosperu do landego via frata
Per la labor' sukcesa de l' popol'!
Kaj miajn bondezirojn ĉi-rilatajn
Akceptu vi kun la plej bona vol'!*

Falas neĝeretoj

(Poemo)

de ADAM PAVLUKOVEC (Belorusio)

*Falas neĝeretoj,
Blankaj neĝeretoj
Sur vizaĝon mian,
Sur la kapon nudan...
Frapas min la sorto,
Sorto mia kruda,
Malfeliĉa vivo,
Aĉa efektivo.
Premas min malĝojo,
Premas min angoro.
Nur ĉagreno nestas
En malsana koro.
Levas mi okulojn
Supren al ĉielo,
Vidas tie nubojn,
Nubojn kaj malhelon.
Kaj disŝiras koron
Morbo kaj deprimo.
Nur trankvile falas
El ĉiel' neĝeroj.
Ho, Jesuo Kristo,
Dio mia kara! —
Preĝas mi kun tristo
Pro la viv' koŝmara. —
Ĉu la vivo daŭros
En mallum' profunda?
Ĉu mi plu bedaŭros
Pri la vivo hunda?
Al mi decus scii
Ululeti, boji,
Ol abnegacii
Aŭ en preĝ' malĝoji...*

BONVENON AL EPC-KUNSIDO DUM LA 81-A UK

La 25-an de julio 1995 ni okazigis kunsidon de legantoj kaj perantoj kadre de la 80-a UK en Tampere, Finnlando. La kunsidon kun pli ol 100 kongresanoj prezidis nia vicĉefredaktorino Tan Xiuzhu. Ŝi raportis pri la eldonado kaj distribuado de EPC, konigis nian situacion kaj informis pri la reagoj al la Fondaĵo EPC-abono. S-ro Dai Song'en, nia nova vicĉefredaktoro, donis informojn pri la Unua Azia Kongreso de Esperanto. Poste oni prezentis multajn bonajn proponojn. Fine s-ino Tan Xiuzhu kore dankis la kunvenantojn pro ilia ĉeesto kaj pro iliaj proponoj kaj kritikoj kaj promesis fari plejblon por plibonigi la revuon kaj distribuadon.

Kiel kutime, ni okazigos kunsidon ankaŭ dum la ĉi-jara UK en Prago. Al la kunsido ni kore invitas la legantojn kaj perantojn, kiuj partoprenos la pragan UK. Pri la dato, horoj kaj salono de la kunsido bonvolu konsulti la Kongresan Libron. Ĉi-sube ni aperigos la proponojn, konsilojn kaj kritikojn prezentitajn dum la lastjara kunsido, esperante, ke ili helpas al vi prepariĝi por nia ĉi-jara kunsido.

La Red.

M. Sujet (Francio): Mi proponas, ke estu antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj, por ke partoprenantoj de la Unua Azia Kongreso de Esperanto povu resti pli longe en Ĉinio.

Raita Pyhälä (Finnlando): Mi nur volas danki EPC, ĉar unu el miaj unuaj ŝtupoj direkte al Esperantujo estas EPC. Mi lernas pri kaj pro la artikoloj en la revuo.

T. Nisikawa (Japanio): Mi proponas plimultiĝi abonantojn. Mia ideo estas starigi novan kategorion de abonkotizo. Kiukategorian kotizon mi pagu, se mi abonos por miaj amikoj? Se eble, donu iom da rabato. Eĉ 5% da rabato kuragiĝos min.

Flory Witdoeck (Belgio): Povas esti, ke kluboj pagos abonojn por aliaj landoj. Do vi devas havi specialan prezon por grupaj abonoj.

W. Harmon (Usono): Nun vi havas alireblon al perantoj per fakso. Tio estas tre helpa. Tamen estus eĉ pli helpa, se vi havus elektronikan retan adreson.

C. Støp-Bowitz (Norvegio): Mi estas prezidanto de Norvega Esperanta Eldonejo kaj ankaŭ peranto de EPC. Nun la revuo alvenas eĉ pli regule kaj pli rapide ol antaŭe. Mi gratulas al vi pro tiu ĉi sukceso. Krome, mi multe laŭdas la tutajn artikolojn de via revuo. Vi havas preskaŭ komplete modelan lingvaĵon, belan preson kaj bonan paperon.

EPC estas, laŭ mia opinio, la plej bona kaj bela unuaranga publikigaĵo en Esperanto, kiun ni povas montri al la homoj.

M. Bronštejn (Rusio): Mi venis speciale por danki la redakcion pro la senpaga sendado de EPC dum pluraj jaroj. Duone dank' al EPC, mi sukcesis fondi Esperanto-klubon en la plej norda urbo de Rusio.

M. Rozikov (Uzbekio): Dank' al la Fondaĵo EPC-abono, samarkandaj klubanoj ricevas la tre plaĉan revuon.

Y. Takeuti (Japanio): Mi ege dankas al la redakcioj de EPC, kiuj meritas nian laŭdon pro sia tre bona kontribuado longjara. Dank' al la gazeto, mi povis bone koni la politikon, ekonomion, kulturon, morojn kaj homan vivon de Ĉinio, najbara lando de Japanio. Lastatempe la enhavo de la gazeto ege pliboniĝis pro la plimultiĝo de Esperantaj paĝoj. Min tre kontentigis la artikoloj pri la forpasinta samideano Zensto, pri la verkoj de Li Shijun kaj Shi Chengtai. Mi proponas, ke via gazeto estu pli internacia. Se vi invitos neĉinajn samideanojn kontribui por via gazeto, tio certe vekos intereson ĉe legantoj en diversaj landoj. Due, bonvolu konsideri pri la speciala kotizo proponita de s-ro T. Nisikawa. Trie, via abonperiodo estas laŭ la kalendara jaro, vi tamen akceptas la renovigon iam ajn en la jaro. Tio tre konfuzas

la perantojn. Do la renovigo nepre estu en la komenco aŭ mezo de la jaro. Se ne, vi donu al ni koncizajn informojn, de kiu monato komenciĝos la renovigo. Alie, multaj forĝos, ĝis kiu monato la abono restas valida.

E. Seidemann (Germanio): Unue gratulon kaj admiregon pro la 45-jara ekzisto de EPC. Vivu Esperanto per popola Ĉinio. En 1994 oni legis sur la kovrilo "en Esperanto", sed en 1995 oni ne plu legis tiujn vortojn. Mi proponas presi sur la kovrilo "en Internacia Lingvo Esperanto". Due mi proponas presi "Esperanto-Revuo" sur la koverto de EPC. Trie, jam de longe mi deziris artikolon pri "La rolo de kabaretoj en Ĉinio". Kiel ili nomiĝas? "Moskitoj" aŭ "Pipro-muelejo" aŭ "Herakles-klabo"?

J.H. Erasmus (Nederlando): Mi rekomendas, ke vi skribu iomete pri la rilatoj inter Ĉinio kaj aliaj landoj. Se vi skribos pri la rilatoj inter Ĉinio kaj Nederlando, vi povos peti intervjuon pere de la nederlanda ambasado. Ni povos montri la artikolon kaj la gazeton en Nederlando. Tio estos bona propagando por Esperanto kaj por via gazeto.

M. Bacev (Bulgario): Mi estas nova peranto kaj deziras havi informojn pri abonoj por pli longa periodo.


C.A. Ferreira Silva (Brazilo): Mi proponas fari artikolojn pri junulaj aferoj. Tiel oni povos ankaŭ instigi al gejunuloj aboni kaj legi vian revuon.

S. Mandrak (Pollando): Mi proponas, ke la ĉinaj ambasadoj aŭ konsulejoj havu kelkajn numerojn de EPĈ, por ke estraranoj de la landaj asocioj povu aĉeti aŭ tralegi dum sia vizito.

A. Pruler (Estonio): Kiel kuracisto, mi ŝatas artikolojn pri medicino kaj pri diversaj lokoj de Ĉinio. Daŭrigu vian laboron.

M. Masiera (Pollando): Kiam mi komencis legi EPĈ antaŭ kelkaj jaroj, mi sciis nenion pri Ĉinio. Dank' al via revuo, nun mi scias pli multe. Min speciale interesas naciaj kostumoj, kulturo kaj arkitekturo.

A. Harju (Finnlando): Mi estas leganto de la revuo jam de 1964 kaj devas diri, ke mi preskaŭ ĉiam estis kontenta pri ĝia kvalito, precipe la lingva korekteco estas bonega, tial ni povas rekomendi la revuon al ĉiuj, kiuj serioze studas Esperanton. Tamen mi devas kritiki certan sloganismon de politikaj kaj ekonomiaj artikoloj. Ĉu necesas tiom ofte ripeti sloganojn pri "reformado" kaj "por-domalfermo"? Malgraŭ mia kritiko



S-ino Tan Xiuzhu (dekstre) kaj s-ro Dai Song'en (sidanta apud ŝi) en EPĈ-kunsido dum la 80-a UK

mi tutcerte kun ĝojo legados la revuon kaj gratulas je ĝia jubilea jaro. Espereble la revuo povos bone jubileisian 50-jariĝon kaj poste 100-jariĝon.

V. Kandalinski (Rusio): La revuo multfoje publikigis artikolojn pri ĉinaj kuracmetodoj, kiujn mia familio kaj du familioj de miaj amikoj daŭre uzas tre efike en nia vivo. Mi volus danki la redakcion por tiuj artikoloj. Min interesas ankaŭ la historio kaj filozofio de Ĉinio.

S. Kulevski (Jugoslavio): Mi deziras, ke EPĈ estu utila ankaŭ por komercado kaj aperigu liston de ĉinaj aĉetaĵoj.

W. Schmid (Japanio): Por ĉiu revuo gravas ankaŭ la enlanda merkato. Vi devas subteni la ĉinajn esperantistojn, kiuj havas intereson lerni Esperanton kaj sin ekzerci. Ĉu vi povus foje aperigi en la revuo statistikon de abonoj laŭlande? Tio certe interesos legantojn. ■


Nova libro eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo

Ruĝdoma Songô

(Volumo I)

"Ruĝdoma Songô" estas unu el la plej famaj klasikaj romanoj de Ĉinio, kiu priskribas la ruiniĝon de iu nobela familio en la lasta periodo de la ĉina feŭda socio kaj la tragedion de juna amanta paro. La romano prezentas la dekadencan de la ĉina feŭda socio kaj ĝiajn diversajn konfliktojn.

La romano estas vaste konata en Ĉinio, kiel verkoj de L. Tolstoj en Rusio kaj la dramoj de Ŝekspiro en Britio. La Esperanta versio de "Ruĝdoma Songô" estas en tri volumoj, inter kiuj la dua kaj tria estos eldonitaj respektive en 1996 kaj 1997.



Formato: 14 x 22 cm. (bind.) 582 pĝ. kun 72 nigraj ilustraĵoj

Prezo: 26.00 USD

Mendu ĉe: Distribua Fako de EPĈ
Libroservo de UEA
Nia peranto en via lando

MI ŝatas bestojn. Pro tio mia amiko donacis al mi testudon okaze de la Nova Jaro.

Ĝi, rara, vivis en lago en suda Ĉinio. Mi portis ĝin al mia hejmo en norda Ĉinio kaj bredis ĝin en vazo. Ĝi estis granda kiel duonmanplato. Ĝi ne manĝis nek trinkis. Mi donis al ĝi pecetojn de viando kaj legomo, sed al ili ĝi eĉ ne turnis rigardon.

Laŭdire testudo estas longviva kaj malsato-eltena. Ĝi ne mortos eĉ sen manĝi dum unu monato. Sed la mia estis tre juna. Kion fari, se ĝi malsaniĝos pro malsato? Kvankam mi ŝatas bredi bestojn, tamen mi kompatas la bestojn en zoo, fiŝojn en akvario kaj birdojn en kaĝo, ĉar ili devas vivi libere en la naturo. Kial mi malliberigis la testudon en mia hejmo por plezurigi min?

Do, mi decidis liberigi ĝin. Tamen frostis vintre en nia

Testudo

de HAN DONG




urbo. Glaciigis la akvokonservejoj en la antaŭurbo. Ĉu tiu testudo el suda Ĉinio mortos tie pro frosto?

En frua printempo mi havis okazon vojaĝi al suda urbo, kiu ne estis ĝia hejmloko, tamen kun verdaj arboj multe pli varma ol nia urbo.

Mi lasis tiun amindan beston en klaran lagon de iu parko. Sed neatendite, ĝi ne fornaĝis, sed restis sur la fundo de la lago. Iom poste ĝi malrapide rampis sur bordon kaj haltis ĉe mia piedo. Levinte la kapon, ĝi rigardis min tre longe. Mi silente rigardis ĝin, kaj miaj okuloj pleniĝis de larmoj. Fine, ĝi returnis sin kaj reiris al la lago.

Jaroj pasis, tamen mi rememoris de tempo al tempo tiun testudon kun oraj vejnoj sur ĝia verda ŝelo. Se ĝi ne estis kaptita, ĝi devis esti granda kiel bovlo. Mi deziras, ke ĝi vivu libere, ĉar ĝi apartenas al la naturo. ■



Avino kaj nepo

LA TERO AVERTAS...

HOMOJ per senĉesaj anormalaj ekspluatadoj superŝargas la terglobon, kaj kaŭze de tio la tergloba donas averton al ili.

Jen timigaj ciferoj: Sur la tergloba ĉiujare malaperas 13.39 milionoj da hektaroj da tropikaj pluvarbaroj, sabliĝas 6 milionoj da hektaroj da tero kaj fluas en marojn 5 000 tunoj da hidrargo, 300 000 tunoj da plumbo, 20 milionoj da kuroj da radioaktivaj substancoj kaj 10 milionoj da tunoj da nafto. Super Antarkto la kvanto de ozono jam reduktiĝis je 40%, troaj ultraviolaj radioj damaĝas imunan sistemon de la homoj kaj minacas ilian sanon. La temperaturo sur la tergloba leviĝis ĉiujare je 0.3-0.6°C, miliono da specioj da animaloj kaj vegetaloj kredeble pereos antaŭ la fino de la 20-a jarcento.

ĈIAM PLI MALGRANDIĜAS LA ARBARO ĈE AMAZONO

En la baseno de Amazono, Latin-Ameriko, troviĝas tropika pluvarbaro, plej granda en la mondo. Ĝi liveras al la homoj grandan kvanton da freŝa oksigeno kaj sciencistoj nomas ĝin "pulmo" de la homaro. Oni taksas, ke la arbaro ĉe Amazono ekzistis almenaŭ cent milionojn da jaroj kaj nun ĝia areo multe reduktiĝis. Ĉi duono de la birdoj sur la terglobo tie vivas. En la tieaj riveroj vivas 1 500 specioj da fiŝoj, dekoble pli multe ol tiuj en la riveroj de la tuta Eŭropo. Estas mistere, ke iuj fiŝoj kaj bestoj, kiaj ŝarko kaj delfeno, kiuj vivis en maro, tie fiksloĝiĝis. En la pluvarbaro kreskas dek mil specioj da arboj. Kaj nun la arbaro suferas seriozan detruadon. Sole ĉe Amazono en Brazilo jam nuligiĝis 320 000 kvadrataj kilometroj da arbaro, kaj draste reduktiĝas sovaĝaj bestoj.

MARSURFACO LEVIĜAS PLI KAJ PLI RAPIDE

Koncerna departemento de UN raportas, ke en la lastaj 4 000 jaroj marsurfaco leviĝis meznombre je 7-8 cm en ĉiu jarcento. Sed en la pasintaj cent jaroj ĝi leviĝis je 10-20 cm. Marsurfaco leviĝas pro du kaŭzoj: Unue, granda ekspluatado kaj utiligado de diversaj energioj, la kemiindustria disvolviĝo kaj kontinua militado estigis forcejan efekton, kio kaŭzis ekspansion de marakvo. Due, glaciriveroj en Arkto kaj Antarkto solviĝas. Pro forceja efekto en la unua duono de la sekvanta jarcento temperaturo sur la tergloba leviĝos je 1.5-4.5°C. Je leviĝo de temperaturo de ĉiu grado sur la tergloba la polusa glacio solviĝos je 5% kaj marsurfaco leviĝos je 70-100 cm.

Leviĝo de marsurfaco kaŭzos katastrofojn al la homoj, 70% de la tero en norda hemisfero estos minacataj. Fakuloj raportis, ke post 50 jaroj la koralaj rifoj disemitaĵoj sur Pacifiko, triono de la delto de Nilo kaj Maldivo

sur la Hindia Oceano eble estos superakvitaj.

MALPLIIĜAS SENSALA AKVO

Laŭ statistiko sur la tergloba estas 1.441 miliardoj da kubkilometroj da akvo, el kiuj 3.499% estas sensalaj, 0.001% vapora kaj 96.5% maraj. 87% de la sensala akvo troviĝas en la du polusoj de la tergloba en formoj de glaciĉapoj kaj glaciriveroj. El tio oni povas vidi, ke la kvanto de akvo por trinkado kaj irigaciado estas malgranda. Kvankam oni povas sensaligi marakvon, tamen tio bezonas altan produktokoston kaj grandan konsumon de energio. Aliflanke, la tutmonda akvokonsumo 4-obliĝis kompare kun tio en la 50-aj jaroj. Nun mankas akvo al 40 landoj kun areo de pli ol 60% de la tero. Pro troa konsumado de la subtera akvo, ĝia akvonivelo malleviĝis ĝis danĝera limo, precipe en la Meza Oriento, Ĉinio, Hindio, Meksikio, Tajlando, Norda Ameriko kaj okcidenta Usono. Ĉiujare 500 milionoj da homoj malsaniĝas pro akva malpureco kaj 10 milionoj da homoj grave suferas de akvomanko.

ACIDA PLUVO FURIOZIĜAS

Acida pluvo estiĝas de poluita medio. Pro industria disvolviĝo ĉiujare 30 milionoj da tunoj da sulfido kaj nitrido vaporigiĝas. Pro la ĝenerala atmosfera cirkulado ilia fumo povas migri ege malproksimen, kaj en la migrado kemia reakcio faras el ili sulfaton. Miksiginte kun akvo, pluvo aŭ neĝo, tiu kemia kombinaĵo pluviĝas kaj falas teren.

Ĉiutage vento enblovas en la aeron super Svedio pli ol 1 000 tunojn da fosfora fumo. Nun en Svedio 18 000 el la 85 000 lagoj estis acidigitaj, kaj en pli ol 4 000 lagoj el ili ne videblas fiŝoj. Ĉiujare granda kvanto da arboj nuligiĝas de acida pluvo. 30% de la 1 500 lagoj ĉe la limo inter Usono kaj Kanado estas poluitaj de acida pluvo kaj en ili la fiŝoj estas pereontaj. En la lastaj dek jaroj okcidenta Germanio estis damaĝita de acida pluvo kaj 8% de la tieaj arboj estis detruitaj. La tiea produktokvanto de ligno duone reduktiĝis. Miliono da hektaroj da arbaroj forvelkis de acida pluvo en la meza Eŭropo.

MARO "RUBUJIĜAS"

Ankaŭ la maroj, kiuj konsistigas plejparton de la tergloba, poluiĝas tago post tago. Ni prenu la Nordan Maron kiel ekzemplon. En ĝi fiŝoj malpliiĝas rapide kaj iuj specioj pereas. 50% de la kaptitaj platfiŝoj estas poluitaj kaj fiŝistoj devis reĵeti ilin en la maron. La tieaj mituloj entenas hidrargon kaj plumbon, 4-oble pli multe ol la normala kvanto.

Ĉio ĉi kaŭziĝis de ekologia malekvilibro de la Norda Maro. Ĉiutage tie navetas ĉ. 500 ŝipoj kaj ĉiujare oni enverŝas tien 100 000 tunojn da eluzita oleo. Krome, ĉiujare la maro englutas 7 milionojn da tunoj da rubo, 7.3 milionojn da tunoj da eluzitaj konstrumaterialoj, 5 milionojn da tunoj da ŝlimo kaj 4 miliardojn da tunoj da malpura akvo. Ĉiujare oni bruligas 70 000 tunojn da eluzita kemiaĵo sur la surfaco de la Norda Maro. En la lastaj jaroj ĉemaraj landoj starigis 60 putborajn platformojn, ĉiujare grandkvanta petrolo enfluas en la maron. Fakte la Norda Maro jam "rubujiĝas". ■

Florkulturisto Li Hongru

Teksto de ZHANG QINGGANG kaj PANG NAIYING

Fotoj de LIU SIGONG

EN 1983 forpasis fama ĉina esperantisto Tikos. Liaj kolegoj tre deziris funebre saluti lin per freŝaj floroj. Ili klopodis aĉeti la florojn en Pekino, sed vane...

Nun en la urbo funkcias multaj flor-butikoj kaj en Ĉinio vigligas florkulturado.

En iu bela tago ni venis en la florkulturejon de maljunulo Li Hongru, en la antikva urbo Qingzhou (Ĉingĝoŭ), Shandong, Ĉinio. "Nia familio Li ŝatas florojn de pluraj generacioj," diris la maljunulo. "Antaŭe ni havis kelon por konservi freŝajn florojn en vitro kaj nun ankoraŭ vivas orangerbo kulturita de mia prapatro."

Li Hongru amas florojn. Iam okazis, ke li kulturis florojn sur ĉiuj siaj kampoj kaj pro tio oni mokridis, ke li ignoras sian ĉefan profesion, t.e. grenproduktadon. Tamen li insistis en sia opinio: Oni certe florumos sian hejmon post bonhavigo. Komence de la 80-aj jaroj li laŭkontrakte kulturis grandan pecon da dezerta tero en la vilaĝo kaj kreskigis sur ĝi florojn. La S-ro Li Hongru kaj liaj envazaj plantoj

floroj prosperis kaj alportis profiton 20-oble pli grandan ol tiu el grenkulturado. Vilaĝestro diris al li: "Vi bonhavigu la unua kaj donu bonan ekzemplon, ke nia vilaĝo estu riĉa je freŝaj floroj." Li kapneis: "Ne, ne sufiĉas nur unu vilaĝo de floroj..." Dekkelkajn jarojn poste, ambaŭflanke de la ŝoseo en Qingzhou aperis multaj vilaĝoj de floroj, kiuj formas verdan koridoron.

En lia 21-hektara florkulturejo pompas orkideoj, tulipoj, osmantoj (*Osmanthus*), cikaso, rododendroj kaj aliaj. La orflava "budhomo" bonodore tiklas la vizitantojn. Ni informigis de la maljunulo, ke la sudorientazianoj aparte ŝatas ĝin kaj rigardas ĝin kiel talismanon. Nun Qingzhou-anoj prenas ĝin kiel donacon al parencoj kaj amikoj. En la florkulturejo kreskas ankaŭ palmoj, kiuj originas en suda Ĉinio. Dekkelkajn jarojn antaŭe, kiam li akompanis sian filon al universitato en suda Ĉinio, tie en parko li trovis la arbojn kaj petis de ĝardenisto iliajn semojn. Akirinte ties konsenton, li havigis al si plensakon da ili.

"Por kulturaj florojn necesas teknikoj kaj informoj." Por tiu celo li abonis pli ol 20 gazetojn. El legado li sciigis, ke en 1984 okazos la Unua Ĉina Foiro de Floroj. Li tuj alvenis al la foiro kiel individua florkulturisto. Tie li rigardis kaj diskutis kune kun fakuloj kaj hejmenrevenis kun multaj materialoj. Leginte ilin, li plilarĝigis sian vidkampon. Li anstataŭigis florspecojn per novaj kaj komencis kulturi arbidajn.

Sed neatendite, en 1987 frua neĝo frostigis liajn centmilojn da florigoj kaj arbidajn. Li ne deprimigis, sed anstataŭe, kredite prenis pli ol 30 000 juanojn de 10 florkulturantoj de Ĉinio kaj kontraŭ la monsumo aĉetis florigojn kaj arbidajn.


Verdigo sur alkala tero estas tre malfacila. Nun Li Hongru trovis la solvon de la malfacilaĵo kaj lia laborfrukto estas patentigita. Por tio li riskis sian vivon. Kiam lia esplorado, por kiu li elspezis 100 000 juanojn kaj konsumis kvar jarojn, estis en grava tempo, serioziĝis ĉe li vaskularito, kiun li suferis 20 jarojn. Kuracisto konsilis, ke li ricevu kruramputon. Pro la urĝa laboro li neniel konsentis. Li diris: "Miaj kruroj estas subtenanto de mia kariero. Mi ne akceptos amputon!" Post kelke da monatoj li mirinde iris al sia kulturejo helpe de lambastonoj.

Li Hongru instruis siajn teknikojn de florkulturado al siaj samvilaĝanoj, por ke ili plimultigu sian enspezon. Ili loĝis en malnovaj domoj aŭ en kabanoj en kulturejoj por flegi florojn. Je mencio pri konstruado de novaj domoj, ili diris: "Ni elspezas antaŭ ĉio por florkulturado kaj por domkonstruado estonte."


Nun floroj de Qingzhou vendigas en multaj urboj de Ĉinio. Novembre de 1995, Li Hongru partoprenis la Internacian Ekspozicion de Floroj en Nederlando, lando de floroj, kun la celo konigi florojn de Qingzhou al aliaj landoj kaj enkonduki en Ĉinion famajn florojn el ili. ■



Flegado



En ĝardeno de ĉinaj rozoj



Floroj transportotaj aliloken



En ĝardeno de envazaj florplantoj



Klientoj

Trajno ekveturis el la Pekina Okcidenta Stacidomo

Teksto de JI PING
Fotoj de ZHAO XI



Trajno ekveturanta

EN la 50-aj jaroj, en Pekino preskaŭ ne estis alta domo. La tiam konstruita Pekina Stacidomo aspektis vere tre grandioza kaj fariĝis unu el la vidindaĵoj de tiu antikva urbo. Cetero, tiutempe la cirkulantaj loĝantoj ne estis tre multaj, sekve estis ankoraŭ tre facile veturi per trajno el tiu stacidomo. En la 80-aj kaj 90-aj jaroj la situacio fariĝis tute alia. Tie de mateno ĝis vespero svarmis homoj. Oni longe vicatendis por aĉeti bileton, mankis sidlokoj en la atendejo, ĉie regis bruo.

Sed hodiaŭ oni ne plu bezonas peni en la Pekina Stacidomo, ĉar okcidente de ĝi konstruiĝis nova moderna stacidomo kaj la unua trajno jam veturis de tie en la komenco de la jaro.

MILDIĜIS LA TRAFIKA MALFACILO

La nova stacidomo estas nomata Pekina Okcidenta Stacidomo. Ĝi multe mildiĝis la streĉecon de fervoja trafiko en Pekino. Ĝi estas grava konstrua programo de la Oka Kvinjara Plano de Ĉinio kaj ankaŭ la startpunkto de la fervojo inter Pekino kaj Jiulong de Hongkong, kiu etendiĝas de la nordo ĝis la sudo de Ĉinio. La nova stacidomo okupas 51 hektarojn, kun plank-areo de 500 000 kvadrataj

metroj. Ĝi estas 7-oble pli granda ol la malnova stacidomo. Ĝi konsistas ĉefe el 4 partoj, t.e. la ĉefdomo, konstruaĵoj por fervojaj laboroj, urba kompletiga konstruaĵo kaj konstruaĵo de poŝta centro.

La ĉefdomo havas 12 etaĝojn kun dependaj kaj akcesoraj domoj ambaŭflanke. Sur la ĉefdomo sidas kvadrata turo en tradicia stilo, kun glazuritaj plurtavolaj tegment-randoj kaj desegnohavaj traboj, 102 metrojn super la tero. En la mezo de la ĉefdomo estas alta arka pordego, kiu aspektas tre majesta kaj bone enkorpiĝis la projektan ideon esti pordego de la ĉefurbo.

Konstrui sintezan domon estas la monda tendenco en projektado de stacidomo. Iu projektinto de la Okcidenta Stacidomo trafe diris: "Bona servo al la pasaĝeroj ne devas sin limigi je transportado de ili. Ĝi ampleksas ankaŭ aliajn koncernajn servojn." Krom biletejo, atendejo kaj pakajejo, en la Okcidenta Stacidomo estas ankaŭ magazeno, restoracio, hotelo kaj amuzejo.

Rilate al dispozicio, en la Okcidenta Stacidomo konstruiĝis alta atendejo de internacia avangarda nivelo kaj placo super aŭtovojo. La alta atendejo sidas super 9 kajoj kaj sinkrona konstruaĵo estas 2-etaĝa kaj 2-insula stacio de suda-norda subtera fervojo. Pasaĝeroj povas envagoniĝi

per kajoj post eliro el la alta atendejo aŭ tuj per subfervoja stacio. Elvagoniĝintaj pasaĝeroj povas eliri el la suda aŭ norda elirejo tra la subtera halo aŭ forveturi rekte per subtera fervojo sen eliri el la stacidomo. En la stacidomo konstruiĝis ankaŭ tuneloj por poŝtaj kaj pakajaj veturiloj. La porpoŝta tunelo kondukas rekte al la domo de poŝta centro. Ĉio ĉi diferencas de aliaj stacidomoj, en kiuj homoj kaj varoj mikse pasas.


Estante kiel la ĉefa pasaĝera stacidomo de Pekino, la Okcidenta Stacidomo disponas 6 kajojn, kiuj akceptas ĉiutage 60 parojn da trajnoj. Tio egalas al la nuna transporta povo de la Pekina Stacidomo. En la jaro 2000 la Okcidenta Stacidomo disponas 9 kajojn, kiuj ĉiutage akceptos 90 parojn da trajnoj. Tian transportan taskon povas kune plenumi la nunaj 3 stacidomoj de Pekino. Tiam multe mildiĝos la malfacilo de bilet-aĉeto kaj trajn-veturado de Pekino.

MODERNAJ PASAĜER-TRANSPORTAJ INSTALAJOJ

Antaŭe, por deponi malgrandan pakajon en la Pekina Stacidomo, pasaĝero devis sin turni al servisto por registri, kaj poste transpreninte la pakajon, la servisto serĉis liberan lokon sur bretaro por meti ĝin. Tio estis peniga laboro kaj povis facile kaŭzi



Pasaĝeroj irantaj al atendejo



En regadejo



En subtera trairejo





En atendejo



konfuzon. Nun tute alia stato videblas en la Okcidenta Stacidomo. En la malferma deponejo komputero laŭ la grandeco de pakajo aranĝas taŭgan keston por la objekto. Oni mem enmetas kaj reprenas la pakajon kaj pagas tiom, kiom kalkulas la komputero. Kompreneble tio estas nur unu el la ekzemploj. Por pasaĝertransporta servo la Okcidenta Stacidomo aplikas multajn elektronikajn ekipaĵojn kaj avangardajn telekomunikajn aparatojn, tiel ke ĝi povas altigi aŭtomatan nivelon kaj servan kvaliton.

Rilate al la anonca sistemo de sintezaj informoj, oni instalas laŭ la unuaperioda plano 120 informajn ekranojn, kiuj ĉiumomente anoncas al la pasaĝeroj pri kurso de trajno, salono de atendo, horo de ekveturo kaj kajo por envagoniĝo. La aliaj pli ol 60 gvidaj ekranoj instalitaj en ĉiuj anguloj de la stacidomo servas por direkti la trapasadon de pasaĝeroj, redukti ŝtopadon kaj plibonigi la ordon. Oni aplikas komputeran teknikon al la elektronika biletvenda sistemo, kiu funkcias sub la reĝo de komputera reto. La sistemo koncentre traktas nominalan valoron, aŭtomate preparas biletojn kaj aŭtomate kalkulas vetur-koston, kio helpas altigon de la kvalito kaj rapideco de biletvendado. En la atendejo, biletejo kaj aliaj lokoj instaligis televida konsultiĝa servo por respondi demandojn de pasaĝeroj.

La Okcidenta Stacidomo la unua starigis biletan centron, kiu laŭ la unuapaŝa plano anticipe vendas pere de komputero biletojn de la 4 stacidomoj de Pekino kaj laŭ la duapaŝa plano anticipe vendos, post identigo de la tutlandaj komputeroj, biletojn por trajnoj en ĉiuj lokoj de la lando.

APEROS PROSPERO ĈIRKAŬ LA STACIDOMO

La loko, kie nun estas la Okcidenta Stacidomo, antaŭe estis malprospera kaj malvigla. La inaŭguro de la Okcidenta Stacidomo donis tre bonan ŝancon al tieaj komercaj servoj. granda prospero baldaŭ aperos tie.

Laŭ la projekto de la Okcidenta Stacidomo, oni faros tie ankaŭ serion da kompletigaj laboroj, ekzemple kunligi la stacidomon kun eksteraj fervojoj, transformi la nunan malnovan var-stacion kaj konstrui

subteran fervojon inter la Okcidenta Stacidomo kaj la Pekina Stacidomo. Krome oni konstruos ankaŭ poŝtan centron, kiu ĉiujare traktos 50 milionojn da poŝtaĵoj, konstruos 4 aŭtovoĵajn trefkruciĝojn, larĝigos 3 stratojn, konstruos telefon-centralon konekteblan kun 150 000 telefonoj, hejtan fabrikon, kiu povos liveri varmon kaj malvarmon al regiono kun areo de 16 milionoj da kvadrataj metroj, 110 000-voltan transformatoran substacion kaj komercan kvartalon kun areo de miliono da kvadrataj metroj sur la suda kaj norda placoj de la stacidomo. Ĉio ĉi radikale ŝanĝos la fizionomion de la okcidenta regiono de Pekino.

Nun bone iras la laboro varbi entreprenistojn por funkciigi restoracion, hotelon kaj magazenon en la

stacidomo. Laŭ antaŭkalkulo de iu Hongkonga aŭtoritata valortaksa instituto, la komerca radiuso de la Okcidenta Stacidomo atingos 4 kilometrojn. Tio signifas, ke la stacidomo alportos prosperon al la ĉirkaŭa regiono kun areo de proksimume 50 kvadrataj kilometroj kaj liveros grandan spacon imageblan por ĉinaj kaj alilandaj investantoj.

Estas antaŭvideble, ke en la proksima estonteco, ĉirkaŭ la Okcidenta Stacidomo aperos larĝaj stratoj, modernaj domegoj kaj senĉesaj homfluo. Tie kolektiĝos kaj disiĝos diversaj informoj, prosperos restoracioj, amuzejoj, magazenoj kaj bankoj. Ĉio ĉi ege favoros al la impeta disvolviĝo de la ekonomio de Pekino. Kaj post kiam ekfunkcios la fervojo inter Pekino kaj Jiulong, la Okcidenta Stacidomo fariĝos pordego de Ĉinio, kiu malfermiĝos al la mondo. ■

"Iru en tiu direkto!"



Koloraj “Rebusoj”

de PANG NAIYING

ESTAS ia pentraĵo, kies brilaj koloroj nasikas ĉe vi nedireblan estetikan senton, ke vi ne povas ne atenti ĝian enhavon, sed post longa rigardado vi ankoraŭ povas ĝin nek kompreni nek forlasi: Vi jam absorbigas en rigardado.

Guste tiaj estas la pentraĵoj de Shi Qin. Kun la supre menciita impresio mi turnis min al ŝi: “Viaj pentraĵoj ŝajne estas koloraj rebusoj,” mi diris. Kaj la juna pentristino diris: “Pentrarto ne estas skemo de la objektiva mondo. Ĉiu verko, eniĝinte en la vidkampon de la rigardantoj, ja permesas, ke ili havu sian propran komprenon.”

Evidente, la tradicia pentr-teorio ne ebligas ĝuste taksi la pentraĵojn de Shi Qin, ĉar ili jam estas for de la tradicia. Por ŝi plej gravas esprimi belecon. Por tio ŝi per imago, troigo kaj anamorfozo kaj sen limigo de tempo kaj spaco faras superrealajn elekton kaj kombilon al homfiguro, objekto kaj pejzaĝo, sekve, ene de ŝia blua pomo brilas orkolora liniaro kaj leĝere dancas mevo, ene de ŝia bunta persiko estas ruĝa kaj blanka simietoj elakvigantaj bluan lunon. Ŝi rigardas la teron kiel la patrinon de ĉiuj estaĵoj. La patrino estas tre bela. La purpura arboradikaro estas ŝia hararo, dum la verdaj folioj kaj ruĝaj fruktoj ŝia bela krono. La pentristino kapablas el la travivaĵo de sia amiko plekti buntan bildon: kolora kolombo kun olivbranĉo en la beko, junulino kun longa rozkolora hararo, ora suno, ruĝa luno, Sidneja Operejo, aminda hundeto... La hararo de la amiko estas pentrita kiel verdaj folioj, kiuj pensigas la saĝon de lia juneco. Ĝuste tiamaniere la pentristino esprimas la belecon kaj prikantas la strebadon de la homaro al ĝi.

Komence Shi Qin lernis dekoraciadon, poste lignogravuradon en la Centra Belarta Instituto. Nun ŝi studas en la freska fakultato de la instituto. El tio videblas ŝia arta strebado. Ŝi diris: “En alilanda piktura lernejo la studentoj lernas ĉion sen distingo de specoj de pentrartoj. Ankaŭ Pablo Picasso lernis ĉinstilan pentrarton.” Ŝi faras ĉinstilan pentraĵon, olepentaĵon, guaŝon, kuprogravuraĵon kaj lignogravuraĵon kun la celo fari distingigon. Tial ŝiaj pentraĵoj estas ŝatataj. Foje, iu sveda pentraĵ-komercisto venis



S-ino Shi Qin

al la instituto kaj el la pli ol 30 verkoj li elektis 6, kiuj ĉiuj estis de Shi Qin.

Ŝi amas popolan belarton kaj vizitis preskaŭ ĉiujn vilaĝojn de ĉinstilaj novjaraj bildoj. Ŝia pentraĵo “Virino kun Ombrello” ege similas al gustoplena novjara bildo, tamen post pririgardo oni trovis, ke ĝi temas pri la tradicia vivo en la kamparo per linioj de ĉinstila pentraĵo, spac-efekto de okcidenta olepentaĵo kaj koloroj de popola novjara bildo. Por elstarigi la vilaĝaninon, heroinon de la bildo, ŝi faris la bildon nekompleta: Estas ne pentrita la pinto de la ombrello; kio estas en la alia mano de la vilaĝanino, atendas aldonon de rigardanto; videblas nur la broditaj pantalono kaj ŝuoj de la sidanta infano; nur duono de la antikva masko estas pentrita..., tamen jam sufiĉas ĉio ĉi por mi trovi la solvon de la rebuso: La vilaĝanino deziras reveni al sia patrino hejmo. Pro pluvo ŝi ne povas kunporti sian fileton, kaj li ploras sidante tere. Ŝi donas al li pomon por kvietigi lin, tamen li ne akceptas. Ŝi do rakontas al li historieton pri diablo... La pentristino ne ŝatas mian klarigon pri ŝia bildo. Ŝia unika deziro ja estas vekti imagon de rigardantoj. Ŝi diris: “Ĉiuj komprenu mian bildon laŭplaĉe.”

Kiam Shi Qin estis infano, ŝia patrino sendis ŝin al muzika kurso de la geknaba palaco kaj ŝian fratino al piktura kurso. Tamen post kelkaj tagoj la fratino forlasis la kurson, ŝi do eklernis pentradon anstataŭ la fratino. Ŝi diris ridetante: “Mi ĉiam ŝatas muzikon.” Ŝi kunfandis lirikismon kaj romantikismon de muziko en siajn pentraĵojn, ĉu en projekto ĉu en kolorigo. En ŝiaj okuloj la luno povas esti blua, rozeta aŭ ruĝa. Sub ŝia peniko la Granda Muro fariĝas diverskolora.

“Se mi pentros la Grandan Muron denove, ĝi aspektos eble ne tia, ĉar koloroj ligiĝas kun animstato,” diris Shi Qin kaj petis min rigardi ŝian novan freskon “Profilo”. Tiu ĉi verdkolora pentraĵo gajnis la plej altan poenton inter la verkoj de la studentoj en la fino de semestro. La pentristino per malsamaj verdoj kaj linioj vidigas ondantajn montojn kaj arbarojn sur ĝi. Mi pensus, ke la verdecga animstato devas esti kvietita kaj bela. Vere, juĝate laŭ koloro la animstato de Shi Qin estas senescepte bona en ĉiuj ŝiaj pentraĵoj.

“Ĉu neniam estis ĉagreno?”

Ŝi diris: “Je ekprenado de peniko estiĝas bona animstato.”



"Kokeriko" (Kolora ĉinstila pentraĵo)

"Virino" (Reliefo)





"Patrino kaj filino" (Olepentraĵo)

"Meditado" (Kupra gravuraĵo)



"Knabino" (Kolora ĉinstila pentraĵo)





"Profilo" (Fresco)

Vojaĝo al Maiji-monto

Teksto de ZHENG ZHENJIE

Fotoj de HAN HONG

MI adiaŭis la antikvan urbon Xi'an kaj faris alian paŝon sur la Silka Vojo.

Por pli bone ĝui la tieajn pejzaĝojn kaj popolajn morojn mi vojaĝis per aŭto anstataŭ per trajno. Mi rigardis la antikvan pramejon de Weihe-rivero, la plej granda branĉo de la Flava Rivero, gastis ĉe kamparanoj kaj vizitis la budhisman ŝtonkavernaron de Maiji-(Majĝji)-monto.

LA UNUA PRAMEJO SUR LA SILKA VOJO

Elirinte el la urboparto de Xi'an, mi vidis, ke la ŝoseo estas pli larĝa kaj pli ebena, kaj nia aŭto kuris pli rapide. Ambaŭflanke de la ŝoseo kreskis sorgo, legomoj kaj kotonujoj kaj la flavaj parceloj estis plugitaj antaŭ nelonge.

Nia aŭto kuris duonhoron kaj antaŭ miaj okuloj aperis Weihe-rivero, obstaklo por vojaĝi okcidenten laŭ la Silka Vojo. Tie estis

la unua antikva pramejo sur ĝi. Antaŭe tie, krom pramoj, estis ankaŭ flosponto super la rivero. La loko estis trafika nodo por pilgrimantoj kaj karavanoj.

Sed ĉi-foje, kiam mi atingis la lokon, mi ne vidis boatojn nek flosponton.


Afabla maljunulo diris al mi, ke multaj serĉis tie postsignon de la antikva pramejo, sed ĉi tiu jam cedis lokon al moderna staja ponto el armita betono.

Mi rigardis en direkto montrita de la maljunulo kaj vidis la ponton, sur kiu navetis aŭtoj. Li diris al mi ankaŭ, ke super Weihe-rivero kuŝas pluraj pontoj kaj pramŝipoj ne estas bezonataj. Trans la rivero estas la urbo Xianyang (Ŝjanjang), pli antikva ol Xi'an. Ĝi estis ĉefurbo de Qin-dinastio (221-206 a.K.) kaj grava urbo de la dinastioj Okcidenta Han, Sui kaj Tang. Nun Xianyang famas pro sia tekstila industrio kaj estas la plej granda bazo de koloraj kineskopoj en Ĉinio.

PARO DA BOVOJ EN PLUGADO

Inter Tongguan kaj Baoji (Baŭĝji) kuŝas la 400 km longa valo — Qinchuan(Ĉinĉuan)-ebenaĵo. Sude de ĝi staras la majes-

SKEMA MAPO DE LOKOJ ĈE SILKA VOJO



ta Qinling(Ĉinling)-montaro kaj norde de ĝi la Leŭsa Altebenaĵo pli ol 1 000 m super la marnivelo. Weihe-ebenaĵo estis unu el la luliloj de la antikva ĉina kulturo kaj unu el la plej fekundaj lokoj de Ĉinio. Kaj hodiaŭ ĝi estas grenabazo de la lando.

En Fufeng-gubernio mi vidis feran plugilon similan al tiu uzata en la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K.-23 p.K.). La plugilo havas timonon por paro da bovoj. La bildo de tia plugilo vidiĝas en Mogao-ŝtonkavernaro kaj sur ŝtona reliefo elterigita en Shaanxi-provinco.

La plugilo konsistas el tri partoj, kun timono 225 cm longa. Dum plugado la timono estas fiksita sur la kolo de du bovoj. Hodiaŭ, kiam modernaj agrikulturaj maŝinoj laboras sur la kampoj, tiaj plugiloj ankoraŭ estas uzataj sur Weihei-ebenaĵo, tio estas vere maloftaĵo.

KAVERNDOMOJ

La provincoj Shaanxi kaj Gansu plejparte troviĝas sur la Leŭsa Altebenaĵo. De antikve lokanoj loĝas en kaverndomoj kun lignaj pordo kaj fenestroj kaj firma tegmento. En ili estas varmete vintre kaj malvarmete somere. Pro facila

konstruado la kaverndomoj estas tre ŝatataj sur la Leŭsa Altebenaĵo. Hodiaŭ ankoraŭ multaj kamparanoj ŝatas loĝi en kaverndomoj.

Mi vizitis la kaverndomojn de maljuna kamparano Liu Zhikui. Sur la pordo de la domo loĝata de li pendis grapoloj da ruĝaj kapsikoj kaj plektoj da maizo-spikoj. La dormejoj, ĉiu larĝa 4 m kaj profunda 6 m, havas arkforman plafonon. Ĝi kaj la internaj muroj estas bonorde masonitaj. La domoj estas helaj, komfortaj kaj sekaj. El liaj ses ĉambroj du interkomunikiĝas. Sur la fenestroj estas gluitaj ruĝaj papertondaĵoj kun bildoj: Pigo sur umeo, Ambirdoj en akvo kaj Leono ludanta kun globeto. La bildoj montras deziron de la dommastro al la feliĉa vivo.

Antaŭ la kaverndomoj estas malgranda korto, en kiu troviĝas staloj de porkoj, ŝafoj, bovoj, hundoj kaj kokoj. La mastro diris al mi: "En la kamparana domo estas tri trezoroj, t.e., kokoj, hundoj kaj infanoj." En liaj okuloj estas feliĉigaj kokeriko, bojado kaj infana kriado. En la pasinteco ili estis nemankigeblaj por la vivo de la loĝantoj sur la Leŭsa Altebenaĵo.

En la kaverndomo loĝata de Liu Zhikui estis kunligitaj kameno kaj

terlito el adoboj. Ĉe hejtado la fumo, tra la truoj sub la terlito, eliris el la kamentubo fiksita sur la fenestro, tial la terlito estis ĉiam varma. En la domo estis ankaŭ ŝranko, kun vekhorloĝo, spegulo, servico por teo kaj vino, vazo kun floro kaj kolora televidilo sur ĝi.

Akompanate de la mastro, mi rigardis la dom-tegmenton. Sur ĝi kreskis hipofaĵoj (*Hippophae rhamnoides*) kaj etendiĝis televida anteno. Li diris al mi, ke la arkforma tegmento el ŝtonoj kaj brikoj estas eltenema kontraŭ premado. Ju pli firma estas la tegmento, des pli likimuna ĝi estas. Kaj oni devas plifirmigi ĝin post kelkaj jaroj.


La kaverndomoj estas propraj al nordokcidenta Ĉinio. Ĉiuj vilaĝoj estas kaŝitaj inter la flavaĵoj kaj oni sentas, ke ili envilaĝiĝas nur tiam, kiam ili aŭdas la homan bruon aŭ vidas fumon el kamentubo. La tieaj loĝantoj estas honestaj, bonkoraj kaj gastamaj. Ili regalaĵojn per jujuboj, arakidoj kaj sukera akvo.

VIZITO DE MAJI-ŜTONKAVERNARO

La aŭto kuris plu okcidenten. Trapasinte la urbon Baoji, ĝi daŭrigis kuradon pliajn du horojn kaj,

La staja ponto super Weihe-rivero

Foto de WEI SHAOYUN





En kamparana korto


Sur Weihe-ebenaĵo






Rikolto de tritiko en Shaanxi

Foto de ZHANG XINMIN



Plugado



Briko kun bildo el la unua jarcento



Esploro pri kreskado de sorgo

elirinte el Shaanxi-provinco eniris en Gansu-provincon. Maijŝtonkavernaro situas ĉe la limo inter la du provincoj. Ĝi estis la unua loko, kiun mi vizitis en Gansu-provinco.

Maiji-monto, alta je 114 m, majestas en la montaro kaj arbaro. Ĝi, maldika en la bazo kaj dika en la mezo, similas al stako. Maijŝtonkavernaro, konstruita sur krutaĵo de la monto, estas unu el la kvar famaj ŝtonkavernaroj de Ĉinio. Nun tie troviĝas 194 kavernoj kun 7 200 argilaj modlaĵoj, kaj 1 300 kvadrataj metroj da freskoj, faritaj de la 4-a jc ĝis la 19-a jc. Ĝi estas budhisma ŝtonkavernaro en la orienta ekstremo de la Silka Vojo.

La ĉinaj ŝtonkavernaroj plejparte estas horizontale konstruitaj sur krutaĵoj, sed Maijŝtonkavernaro vertikale sur tri flankoj de la monto. Inter la kavernoj supraj kaj malsupraj estas helicaj viaduktoj.

Mi grimpis supren laŭ viadukto, rigardis malsupren kaj sentis vertiĝon. Ĉinaj antikvuloj admiris: "Budhajn statuojn en miloj da ni-

ĉoj kaj kavernoj sur krutaĵoj faris ja homoj, tamen kun helpo de la dia povo." Vizitinte la lokon, mi konsciis, ke la admiro ne estas troigita. Maijŝtonkavernaro estas fama pro siaj argilaj modlaĵoj. La grandaj kavernoj en ĝi larĝas pli ol 30 metrojn, kaj la malgrandaj povas enteni nur unu homon. Iuj el la statuoj altas 15-16 metrojn, dum la plej malgrandaj nur 10 cm. La ŝtonkavernaro kun statuoj faritaj en malsamaj periodoj similas al muzeo de argilaj modlaĵoj. Ĝi bone montras la disvolviĝon de la ĉina modlarto en malsamaj dinastioj.

La tieaj budhajn statuoj plejparte havas afablan mienon kun klinita kapo, escepte tiujn faritajn tre frue. Kvankam ili estas sanktuloj el la budha regno, tamen je la vizaĝo ili ne multe diferencas de la ordinaraj homoj. Nur la statuoj faritaj en tre frua periodo portas okcidenta-azianajn kaj hindajn trajtojn, sed tiuj, faritaj en la Norda Wei (386-534) kaj sekvantaj dinastioj, tute similas al hanoj de Ĉinio.

Ĝenerale dirite, oni ne donis

grandan atenton al koloro de la argilaj modlaĵoj. Pro tio la modlaĵoj aspektas versimilaj kaj modes-taj. Kun tempopaso ili fariĝas pli naturaj.

Tie la modlaĵoj estas allogaj kaj la pejzaĝoj ravaj. Inter la famaj ŝtonkavernaroj de Ĉinio Maijŝtonkavernaro havas la plej belan pejzaĝon ĉirkaŭ si. La monto Maiji situas ĉe la okcidenta parto de Qinling-montaro kaj tie estas malvarmete somere kaj varmete vintre. Proksime de la montpiedo estas la fonto de Hanshui, granda branĉo de Yangzi-rivero. Tie en somero kaj aŭtuno la pejzaĝo estas aparte bela kaj la aero refreŝiga.

Mi rapide surgrimpis la montosupron kaj rigardis malsupren. Mi vidis, ke tie verdaj pinoj baniĝas en nubmaro. Mi pensis, ke eble tio estas la fama pejzaĝo "Nuboj kaj pluvo de Maiji-monto", sed lokanoj diris al mi, ke la plej bela pejzaĝo de la monto aperas en printempo kaj aŭtuno. Tiam ofte pluvetas, ŝvebas densaj nuboj kaj vualas nebulo. ■





Loĝantoj antaŭ sia kaverndomo

Foto de **WANG YI**

Kaverndomoj en Shaanxi

Foto de **REN HUA**





Maiji-monto



Budhostatuo en Maiji-monto

Statuoj de servistoj en Maiji-monto



NACIO DE TRANSLOĜIĜO

de GUO MIN

Mjaŭ-aj knabinoj en festaj vestoj



FINE de la 70-aj jaroj iu mjaŭ-nacia junulo venis en Usonon por studi. Kun miro li rimarkis, ke ankaŭ tie vivas liaj 100 000 samnacionoj, kiuj eĉ fondis la Usonan Asocion de Mjaŭ-oj.

Fakte mjaŭ-oj ekzistas ne nur en Usono, sed ankaŭ en Kanado, Argentino, Francio kaj Aŭstralio, kaj pli multe en Vjetnamio, Laoso kaj Tajlando de sudorienta Azio.

En Ĉinio vivas 7 398 000 mjaŭ-oj, dissemitaj pli vaste ol aliaj nacimalplimultanoj. Dense loĝas mjaŭ-oj en la provincoj Yunnan kaj Guizhou sudokcidente kaj Hunan meze de Ĉinio. Ankaŭ en Guangxi (Guangŝji), Sichuan, Hainan kaj Hubei loĝas nemalmultaj mjaŭ-oj.

Kial la mjaŭ-oj dissemiĝas tiel vaste en Ĉinio, tio rilatas al iliaj transloĝigoj en la historio, kiu rakontis al homoj ilian malfeliĉan pasintecon.

Antaŭ pli ol 5 000 jaroj la mjaŭ-oj jam vivis en la meza kaj malsupra basenoj de la Flava Rivero, apartenantaj al la Centra Ebenaĵo de Ĉinio. Dum la bataloj inter triboj la mjaŭ-oj estis venkitaj de Huangdi-tribo kaj retiriĝis al la meza kaj malsupra besenoj de Yangzi-rivero. Tiel formiĝis la tribo "San Mjaŭ". Tio probable estis la unua transloĝigo de mjaŭ-oj.

Poste atakitaj de alia tribo, la mjaŭ-oj refoje transloĝiĝis. Iuj el ili post longa tempo migris de la nordokcidento al sudokcidento de



Mjaŭ-a danco kun ludo de muzikilo *luŝeng-o*

Ĉinio kaj fariĝis prapatroj de la nunaj mjaŭ-oj, kiuj parolas la okcidentan dialekton. La restaj migris iom post iom de la Centra Ebenaĵo al la okcidento kaj suda montaro de Ĉinio kaj fariĝis prapatroj de la nunaj mjaŭ-oj, kiuj parolas la orientan kaj centran dialektojn.

Dum transloĝiĝo la mjaŭ-oj povis trovi nur dezertan lokon por loĝi. La malfacila vivo igis la mjaŭ-ajn prapatrojn komenci multajn longdistancajn, longtempajn kaj oftajn transloĝiĝojn. Inter la mjaŭ-oj cirkulas popolkanto, kiu priskribas, kiel iliaj prapatroj sur ebenaĵo, travivinte malfacilaĵojn, fiksloĝis tie, kie ili nun vivas. La kanto tekstas kiel jene:

*La suno kaj luno ja iras al la okcidento,
riveroj fluadas al la oriento.
Prapatroj migradis en sunsubira direkto,
trans montoj kaj ankaŭ riveroj
nun ili atingis jam la okcidenton.*

Dum la 1-16-a jc. la mjaŭ-oj faris kelkajn grandskalajn transloĝiĝojn. Ofte okazis, ke malgrandaj grupoj aŭ unuopaj familioj transloĝiĝis “en direkto al sunsubiro”. Tiel ili facile disiĝis.

La mjaŭ-oj transloĝiĝis ne nur en sudan Ĉinion, sed ankaŭ en aliajn landojn. Ili transloĝiĝis grand-

skale en Vjetnamion trifoje antaŭ 300, 200 kaj 100-140 jaroj. Poste ili iris de Vjetnamio al Laoso, Tajlando, Eŭropo kaj Ameriko.

Pro disa loĝado kaj influo de diversaj kondiĉoj, multaj diferencoj ekzistas inter la dialektoj, kostumoj, festoj, artoj ktp. de mjaŭ-oj en malsamaj lokoj. Tia fenomeno estas malofte videbla en la aliaj 54 nacimalplimultoj de Ĉinio.

Ekzemple, laŭ fonetiko, leksikono kaj gramatiko, mjaŭ-lingvo estas dividita en 3 idiomojn kaj kelkajn dialektojn. Krom mjaŭ-lingvo, parto da mjaŭ-oj parolas ankaŭ lingvojn de aliaj nacioj kaj ĉefe tiun de han-nacio.

Ĉar mjaŭ-oj havas diversajn kostumojn, en Ĉinio oni ofte laŭ tio nomas ilin mjaŭ-oj longjupaj, mallongjupaj, ruĝaj, nigraj, blankaj aŭ floraj. Kompreneble tiuj titoloj ne estas sciencaj, tamen per ili oni pli aŭ malpli konas la riĉan kulturon de la mjaŭ-oj.

La transloĝiĝa historio ne nur kulturis la obstinecon de la mjaŭ-oj, sed ankaŭ influis ilian vivmanieron. En suda Sichuan sur la plisita jupo de mjaŭ-aj virinoj videblas tri paralelaj punktoj — la supra signifas la Flavan Riveron, la meza Yangzi-riveron kaj la malsupra la sudokcidentan montregionon. Ili simbolas transloĝiĝojn de la prapa-

troj de mjaŭ-oj. En la sudo de Sichuan, kiam okazas nupto, la novedzino devas unue iri en la orienta direkto, akompanate de siaj parencoj, kaj poste eniri en la domon de la novedzo, eĉ se ĝi ne estas oriente. En funebra ceremonio antaŭ ĉio la ritogvidanto direktas la animon de la mortinto al oriento, por ke la lasta kunestu kun la prapatroj. La kapo de la enterigita mortinto nepre devas rigardi al oriento.

Aliflanke, longtempa kaj grand-skala transloĝiĝo serioze malutilis al la socia evoluo de la mjaŭ-oj kaj multe konsumis ilian riĉaĵon. Pro tio la mjaŭ-oj vivis en malriĉeco dum longa tempo. Kiel menciite, la mjaŭ-oj transloĝiĝis ĝenerale en sovaĝan montregionon, tial la malbonaj cirkonstancoj malhelpis la progreson de laborforto. Tio estas unu el la ĉefaj kialoj de postĝinteco de la mjaŭ-a socio. Ankaŭ disa loĝado kaŭzis mankon de interkompreno inter la mjaŭ-oj kaj malhelpis la unuiĝon de iliaj politiko, ekonomio kaj kulturo.

Hodiaŭ, malgraŭ ke la mjaŭ-oj vivas en malsamaj lokoj de Ĉinio kaj ekzistas multaj diferencoj inter ili, ili ĝuas rajton de egaleco kaj aŭtonomeco. Transloĝiĝo jam fariĝis pasintaĵo. La mjaŭ-oj estas diligente konstruantaj sian hejmlokon. ■

LA Pakistana Esperanto-Asocio (PEA) elektis min kiel reprezentanton por partopreni en la Tria Ĉina Kongreso de Esperanto en Chongqing (Ĉongĉing). La 24-an de septembro 1995 mi adiaŭis miajn samideanojn de PEA en la Islamabada Flughaveno kaj ekflugis al Urumqi (Urumĉi) de la Xinjiang(Ŝingĵang)-a Ujgura Aŭtonoma Regiono de Ĉinio.

Post 2.5-hora flugado mi atingis Urumqi. Mi telefonis al Liu Xiaozhe (Liŭ Ŝjaŭĝe), faka delegito de UEA pri komerco kaj turismo en Urumqi, por renkontiĝi kun lokaj esperantistoj.

Malfeliĉe, pri ia kaŭzo mi ne povis partopreni la Chongqing-an kongreson. Mi do ŝanĝis mian programon kaj decidis viziti Xinjiang kaj renkonti geesperantistojn de la Xinjiang-a Esperanto-Asocio (XEA).

Liu Xiaozhe, vicĝenerala sekretario de XEA, diris al mi, ke laŭ areo Xinjiang estas la plej granda el la kvin naciminoritataj aŭtonomaj regionoj de Ĉinio, kie oni povas ellabori leĝojn en iuj flankoj. Xinjiang estas la plej granda tia regiono en Ĉinio laŭ areo. Ĝi okupas sesonon de la tutlanda areo. La oficialaj lingvoj de Xinjiang estas ujgura kaj han-a. Sed la fakto estas, ke en norda Xinjiang preskaŭ ĉiuj povas paroli la han-an lingvon kaj en suda Xinjiang — la ujguran. En Xinjiang estas dekelke da nacioj, kiaj ujgura, hana, kazaha, mongola, ŝiboa, uzbeka, rusa kaj huja.

La 26-an de septembro mi kaj s-ro Liu venis al Changji (Ĉangĝji). En la stacidomo min varme bonvenigis lokaj samideanoj. Poste ni venis al la oficejo de la Changji-a Esperanto-Asocio (CEA) kaj ĝoje interparolis pri la ĉina kaj pakistana Esp-movadoj. Mi konigis al ili, ke la Pakistana Esperanto-Asocio havas sep lokajn grupojn de Esperanto en sep urboj. Ili konigis al mi, ke d-ro Niu Shenjun (Niŭ Ŝengjun) estas ĝenerala sekretario de CEA. En Changji estas 36 geesperantistoj. Multaj el ili

SHABBIR AHMAD (Pakistano):

VOJAĜO EN XINJIANG

estas doktoroj. Ili aranĝas monatan kunsidon regule kaj ankaŭ jaran kunvenon.

Ĉe tagmanĝo ni diskutis pri nia kunlaboro. Posttagmeze mi vizitis la urbon, akompanate de ili, kaj vespere mi kaj s-ro Liu revenis al Urumqi.

Ĝa sekvantan tagon mi komencis bazan Esperantan kurson en hotelo de Urumqi. Du pakistanaj komercistoj eklernis Esperanton. Mi instruis ilin ĝis la 30-a de septembro.

En la sekvantaj du tagoj mi vizitis Urumqi kaj ĝiajn vendejojn kaj renkontiĝis kun lokaj esperantistoj.

La 30-an de septembro s-ro Liu aranĝis por mi kunsidon kun s-ro Guan Fengsheng, prezidanto de XEA. S-ro Guan regalis min per tagmanĝo. Li diris, ke ili ĝojas pro mia vizito kaj ni kune laboros por progresado de Esp-movado. Li diris ankaŭ, ke XEA kun pli ol 100 membroj fondiĝis en 1984 kaj havas diversajn fakojn: eduko, turismo kaj komerco. La eduka fako aranĝas Esperanto-kursojn, la turisma aranĝas turismon kaj la ko-

merca fondis komercan kompanion: la Urumqi-a Verda Kompanio de Xinjiang.

La programo de kunlaboro inter PEA kaj XEA estis decidita kiel jene:

La Pakistana Esperanto-Asocio donacos siajn novajn Esperanto-librojn al XEA kaj siavice la Xinjiang-a Esperanto-Asocio donacos samon al PEA.

Geesperantistoj de XEA vizitos Pakistanon kaj tiuj de PEA vizitos Xinjiang.

Por progresado de Esp-movado en Ĉinio kaj Pakistano, PEA kaj XEA koresponde kontaktiĝos.


S-ro Guan Fengsheng proponis komercan kunlaboron inter esperantistoj de PEA kaj la Urumqi-a Verda Kompanio de Xinjiang.

S-ro Guan esperis, ke kun la helpo kaj gvido de la decidita programo de kunlaboro la Esperantomovado progresos en Pakistano kaj Ĉinio.

Vespere ili enbusigis min kaj diris al mi adiaŭon kaj bonan vojaĝon. La 6-an de oktobro mi revenis al Pakistano. ■

La aŭtoro (la dua de dekstre en la antaŭa vico) kaj Xinjiang-aj samideanoj antaŭ la Esperanta Klinikoj de la Esperanta Vestofarejo





S-ro Bi Fujian en Arkto

DENG JIANYONG:

DUM LA TAGOJ EN ARKTO

LA 38-jara Bi Fujian (Bi Fuĝjan) estas altstatura kaj belaspekta. Aprile de 1995 li, kiel reĝisoro kaj kameraisto de la televida stacio, atingis Arkton kune kun la ĉina scienca ekspedicio. Ĉi-sube mi rakontos kelkajn fragmentojn de ilia aventuro en Arkto.

Antaŭtagmeze de la 23-a de aprilo 1995 s-ro Bi kaj la ĉina scienca ekspedicio el 7 ĉinoj kaj 2 usonanoj iris sur la senliman glacian Arktan Oceanon (87°58'N). Jam pasis la unua ekscitiĝo. La aviadilo, kiu portis ilin tien, forflugis kaj malaperis iom post iom sub la horizonto. Starante sur glacio, s-ro Bi tuj sentis, ke soleco invadis lin ĝis la ostoj. Li subite komprenis: ekde nun ĉio dependos de ili mem. Ili sledis al la norda poluso, kun 20 eskimaj hundoj.

En Arkto ĉio estis neĝkovrita. Portante la kameraon, s-ro Bi volis filmi ĉion, kiam ekspedicianoj

marŝis sur glacio, faris sciencajn esploradojn dum vojaĝo, prenis manĝaĵojn kaj kampadis, kaj eĉ kiam ili dormis. Kaj li ne povis fari al ili tian aŭ alian peton pro filmado. Li eĉ ne sciis, ĉu la aparatoj povas akomodiĝi al la arkta medio. Do li devis esti aparte singardema, por ke ili bone funkciiu. Alie, li povus fari nenion en Arkto.

En la 5-a tago, kiam la ekspedicio estis survoje, aperis en la ĉielo longa strio da nuboj. Kion tio signifis? La sperta usona gvidanto tuj fariĝis serioza, ĉar li komprenis, ke ili renkontis teruran tondazonon. Li laŭte kriis, ke ili ĉiuj sin retiru. Returninte la kapon, s-ro Bi stuporiĝis: ĝuste en la loko, kie ili estis, grandega tavolo da glacio leviĝis iom post iom, kun tundra bruoj. Li instinkte kaptis la kameraon. Sammomente iu furioze kriis al li: "Ne! Ne! Ne!" Malgraŭ tio, li ekfunkciigis la aparaton. Tiun momenton la alia usonano sin ĵetis al li, forte kaptis lin

je lia ŝultro kaj retiris lin. Fuĝinte en sekuran lokon, s-ro Bi sin returnis kaj vidis ion teruran: tie, kie li estis por filmi, stariĝis glacia muro pli ol 3 m. alta kaj oblikve eniĝis en la profundan Arktan Oceanon. Se li persiste filmus tie, li certe falus en la Arktan Oceanon. Je tio liaj haroj hirtiĝis.

En la sekvanta tago, kvankam la minaco de la tonda zono ne pasis, tamen la ekspedicio sin direktis al la celo difinita. S-ro Bi ne forgesis sian mision. Li intencis filmi serion da scenoj pri la ekspedicio marŝanta sur glacio. Sed li ne atendis, ke li falis en pli danĝeran situacion. Preninte la kameraon, li konfidis sian sledon al iu ekspediciano. Li elektis lokon taŭgan por filmado. Ekspedicianoj rapide pasis preter li. Neniu atendis lin, ĉar li estis laboranta. En la ekspedicio li estis la plej forta kaj brava. Li povis skii rapide. Li okule sekvis kune kun la aparato la ekspedicianojn, ĝis ili malaperis el la sekvenco. Tre kontenta pri tio, li volis prezenti sian pozicion kun la piedoj kiel cirklocentro kaj filmi la ĉirkaŭajn glaciajn montojn kaj neĝkovritan Arktan Oceanon. Sed subite lia ventro doloris lin.

Post momenta ripozo li sentis sin iom bone. Surdorsiginte la kameraon, li rapide skiis antaŭen laŭ la spuroj postlasitaj de la ekspedicio. Iom post iom li laciĝis, ĉar la ŝarĝo sur li pezis je 50 kg., sed tiu sur alia je ĉ. 20 kg.

Subite li rimarkis nebulon. Li vidis nenion 50 m. malproksime. La suno sin kaŝis. Inter la senlima ĉielo kaj vastega Arkta Oceano densis gaza nebulo. Li rememoris vortojn de la usona gvidanto: polusaj ursoj viglas en tiu loko kaj oni jam rimarkis iliajn spurojn. Pli terure estis, ke polusaj ursoj aspektas malrapidemaj, sed ilia ataka rapideco en mallonga distanco superis 200 km/h. Se nur ili vidos iun beston, ili certe pereigos ĝin. Polusaj ursoj timas eskimajn hundojn, sed nun s-ro Bi estis sola. Je tio la bravulo ektimis.

Pli kaj pli dense nebulis kaj ekneĝis. La kamerao sur lia dorso pezis kiel fera bulo. La ĉirkaŭaj glaciaj montetoj jen aperis jen malaperis en la nebulo. En liaj okuloj ili ĉiuj similis al polusa urso. Li dronis en malespero, pensante, ke li, elĉerpita, falos sur glacian kaj estos kovrita de neĝo kaj formangita de polusa urso. Li ekpensis pri siaj gepatroj, edzino, gefratoj kaj geamikoj...

Li pensis, sed ne kuraĝis halti kaj rigide moviĝis antaŭen kiel besto. La 50-kilogramo aparato fariĝis tiam pli kaj pli peza por li. Kaj plie, kun piloj pendantaj ĉe lia talio, li anhelis senĉese. Momenton venis en lian kapon ideo: forĵeti la aparaton, tio povus rapidigi liajn paŝojn. Homo estas pli grava ol aparato. Ĉu piloto ne estas permesita paraŝuti en danĝera situacio? Sed li tuj retiris sian penson. La aparato estis lia vivo. Li preferis morti ol forĵeti ĝin.

Finfine li atingis la ekspedicion. Li ne sciis, kio instigis lin. Nur post tiam li malsaniĝis je kola

vertebro. Pro tio li suferis dum longa tempo.

En la 10-a kaj 55 minutoj de la 6-a de majo 1995, la ekspedicio atingis la nordan poluson (90°N) post la vojaĝo de 220 km. en Arkto. Starante sur la norda poluso, la ekspedicio deklaris al la tuta mondo, ke ĉinoj konkeris tiun lokon.

Tiam s-ro Bi estis pli sunbruna kaj malpli bela ol aliaj, kun nazo kaj lipoj vunditaj kaj haroj taŭzigitaj. Tamen la sukceso rekompencis lian penadon. La televidaj filmoj, kiujn li faris dum la vojaĝo, daŭras 2 400 minutojn kaj la kinofilmoj 30 minutojn. Per ili li povas bone konigi Arkton al ĉinoj. Liaj travivaĵoj en Arkto indas rememoron por lia tuta vivo. ■

Membroj de la ĉina ekspedicio en Arkto



La ĉina ekspedicio ĉe la norda poluso



Batalo kontraŭ pornografia veneno

SEKVE de rapida evoluo de la modernaj sciencoj kaj teknikoj, en Ĉinio, inventinto de la paperfardo kaj tipografio, okazas la revolucio de eldonado kun magnetismo, optiko kaj elektroniko kiel novtipaj transportiloj. Tamen preskaŭ samtempe, kiam ĉinoj komencis ĝui tiujn freŝajn spiritajn nutraĵojn, venis maltrankvilo pri tiuj transportiloj.

Ĉi-sube estas longa letero skribita de ordinara laboristino al ŝia urbestro. Estante patrino, ŝi detale rakontis damaĝon al sia filo kaj ĉagrenon de sia familio kaŭzita de elektronikaj eldonaĵoj. Ŝi skribis:

“Mi estas ordinara mezaĝulino kaj havis feliĉan familion antaŭe. Sed lastatempe ofte larmoj inundas mian vizaĝon kaj sendormeco

turmentas min nokte.

“Mi rakontu de la komenco. Mia filo eklernis komputorikon en la pasinta jaro kaj progresis kontentige. Mi kaj mia edzo interkonsiliĝis longe kaj finfine decidis aĉeti komputeron por la filo per pli ol 8 mil juanoj. Nia familio ne estas riĉa, eĉ nia televidilo ankoraŭ estas nigra-blanka. Tamen ni opiniis nian faron inda. Ho ve! Ekster nia atendo, ĝuste tiu komputero alportis ĉagrenon.

“En la lastaj du monatoj mi trovis, ke la filo kondukas kaŝeme kaj ofte sin fermis en sia ĉambro. Komence mi ne rigardis tion grava. Sed montriĝis poste, ke liaj poentoj de la lecionaj ekzamenoj malleviĝis rapide, eĉ nur iom pli ol 60. Iutage, lia instruisto telefonis al mi, ke de kelkaj monatoj mia filo ne absorbiĝas en leciono kaj

kvazaŭ havas ian sekreton. Tiom pli en la lastaj posttagmezoj li eĉ forestis for de la lecionoj. Mi malfermis la pordon de lia ĉambro kaj trovis, ke li kaj liaj du kunlernantoj spektas filmon antaŭ la komputera ekrano. Mi ĵetis rigardon sur la ekranon. Ho, dio mia! Kiel abomenindaj scenoj! Mi ektermis de forta kolero kaj gape alnajliĝis ĉeloke, ne sciante kion fari...”

Publikigite en ĵurnalo, la leteroj vekis vastan atenton en la socio, ĉar nemalmultaj infanoj kaj familioj estas damaĝitaj de sonbendoj, videobendoj kaj elektronikaj eldonaĵoj kun obscena kaj pornografia enhavo.

Pekinaj publik-sekurecaj departementoj faris enketadon al 112 lernantoj de dekelkaj gimnazioj, kiuj konfesis, ke ili legis pornografiajn eldonaĵojn, kaj konkludis: Inter tiuj lernantoj 94% multe malprogresis en la lernado kaj malviglis spirite, 52% ofte babilis inter si pri seksaj aferoj, 21% skribis amleterojn kaj amindumis virinojn, kaj 48% kondukis fripone kaj kontraŭleĝe. En iu profesia mezlernejo de la provinco Jiangsu (Ĝjangsu), deliktado de lernantoj pli kaj pli furioziĝis en la lastaj jaroj. Enketo konfirmis, ke el la 260 lernantoj 204 legis pornografiajn librojn kaj videobendojn. Laŭ koncernaj materialoj, inter la geknaboj senditaj al pundomo 90% estis influataj de pornografiaj eldonaĵoj.

Ĝuste kiel iuj edukistoj diris, la elektronika pornografia veneno estas netakseble granda. Povas esti, ke unu pornografia VCD nuligos

Fabrika malpermesita produkti plagiatan kaj obscenan CD



la efikon de nia lerneja kaj familia edukado kaj eĉ pereigos la junan generacion.

Do, de kie venas tiaj perversaĵoj? Laŭ esplorado, la ĉefa fonto sin trovas eksterlande. Kaj en Ĉinio iuj fabrikoj sekrete reproduktas tiajn pornografiajn diskojn kaj bendojn. La VCD, rigardita de la filo de la supre menciita patrino, ja devenis de iu ĉina kompanio. Kiam koncerna departemento faris kontroladon al ĝi, oni trovis ĉe-loke plagiatajn kaj obscenajn CD, VCD, fotografiajn filmojn kaj aliajn gravajn atestaĵojn.

Oni povas diri, ke la transmisiado de tiuj pornografiaj sonbendoj, videobendoj kaj elektronikaj eldonaĵoj iras laŭ diversaj kanaloj. Tiuj aĉetblas en la nigra merkato, aŭ kaŝe disvastiĝas al la socio el balejoj, amuzejoj de elektronikaj ludoj, laserradiaj projekciejoj kaj neoficialaj kluboj. Plie, kiam ekpopulariĝis komputero en ordinaraĵoj, ankoraŭ pli multiĝis viktimoj de la pornografia veneno. Precipe la geknaboj, kiuj, sin trovante en pubereco, estas nebulaj pri la seksaj aferoj kaj forte scivolemaj ĉiflanke, facile kapteblas de pornografiaj bildoj de la elektronikaj eldonaĵoj. Aplikante komputeron, kies softvaroj havas la funkcion dialogan inter la komputero kaj la manipulanto, la lasta povas libere disponi la voluptajn scenojn de pornografiaj softvaroj kaj ebligas al si rekte partopreni en obscenaj agoj. Pro tiel profunda venenado de la pornografiaj elektronikaj eldonaĵoj, oni devas senprokraste bremsi ties eldonadon kaj disvastigon. Tio rilatas kaj al protekto de la intelekta proprieto kaj al tiu de la socia sekureco, redukto de krimoj kaj garantio al sana kreskado de la geknaboj.

En 1991 Ĉinio ellaboris "Protektan Leĝon de Komputeraĵoj Softvaroj", kaj laŭdire, ĝi estas unu el la kelkaj landoj, kiuj speciale ellaboris kodojn por protekti komputeraĵojn softvarojn. En 1995 Ĉinio lanĉis kampanjon en diversaj lokoj celante elimini la pornografiaĵojn venenon en la eldonado de son-

bendoj, videobendoj kaj elektronikaj fabrikoj, kaj akiris rimarkindan efikon. Koncerna departemento de Pekino persistas en la neregula kontrolo al la Elektronika Strato de Zhongguancun-kvartalo, entreprenanta ekskluzive elektronikajn fabrikojn, arestis plurajn kontraŭleĝulojn, kiuj ofertis pornografiajn eldonaĵojn, kaj ruinigis kelkajn punktojn, kie ili kontraŭleĝe fabrikis kaj vendis pornografiaĵojn. Ankaŭ Ŝanhajo, Tianjin, Guangdong kaj aliaj urboj kaj provincoj aktive ekagis, konfiskis kvanton da pornografiaj softvaroj, CD kaj VCD, kaj forbruligis tiun "psikan opion" antaŭ la publiko.

Ĉinio jam havas kompletan da relative perfektajn kodojn pri administrado de la paperaj eldonaĵoj, sed ne estas sperta en administrado de la elektronikaj eldonaĵoj. Por garantii sanan kreskadon de la novemergiinta kultura afero — eldonado de sonbendoj, videobendoj kaj elektronikaj fabrikoj, samtempe kun batalo kontraŭ pornografia veneno kaj kontraŭleĝa agado en tiu kampo, Ĉinio ellaboras konformajn leĝojn kaj statutojn, postulante ke la administrantoj renovigu sian konon kaj fariĝu kom-

petentaj en ĉiuj ĉeneroj de eldonado, importado, pogranda vendado kaj detalado, kaj paŝo-post-paŝe perfektigu la socian kontrolan sistemon.

Dum la landskala batalo kontraŭ la pornografiaj elektronikaj eldonaĵoj, koncerna departemento de Ĉinio alprenis serion da rimedoj, ekzemple, postenigi kontrolistojn en fabrikoj de CD kaj VCD, por ke la reproduktado kaj prilaborado estu sub la rigora kontrolo; en la tuta lando malpermesi la komercan projekciadon de la laserradiaj rakontfilmoj; baldaŭ efektiviĝos en Ĉinio "Portempa Difino pri Administrado de Elektronikaj Eldonaĵoj". Krome, jam komenciĝas "Projekto pri Movbildaj Libroj", kun eldonado de la infanaj legaĵoj kiel la ĉefa celo, interalie, la Ŝanhaja Infana Eldonejo preparas la elektronikan eldonon de "Infana Leksikono" kaj tiun de la libro "Centmilo da Kialoj". Tiuj elektronikaj legaĵoj el la eminenta kultura heredaĵo de la ĉina nacio donos riĉan spiritan nutron al la geknaboj.

Ke redonu bluan ĉielon al la infanoj, tio estas komuna deziro de ĉiuj lernejoj, familioj kaj la tuta socio. ■

Kontraŭleĝaj eldonaĵoj konfiskitaj



PAROLANTE pri la homaj manĝaĵoj, oni tre malmulte asocias ilin kun insektoj, kiuj eĉ estas malfacile akcepteblaj por multaj kiel manĝaĵo. Tamen pli kaj pli multaj scienc-esploraj fruktoj pruvis, ke insektoj estas bongusta manĝaĵo. Pro loĝantara kresko greno kaj mar-produktaĵoj ne povos kontentigi la bezonon de la homoj, iaokaze insektoj povos fariĝi unu el la riĉfontoj de manĝaĵoj.

Sur la tero troviĝas 5-10 milionoj da specioj da vivaj estaĵoj, kiuj plejparte estas animaloj, kies pli ol 80% estas insektoj. Biologoj diris, ke la totala kvanto de insektoj sur la tero kredeble superis tiun de ĉiuj aliaj animaloj je pli ol dek obloj.

Biologoj malkovris ankaŭ, ke la manĝeblaj insektoj plejparte estas nutroriĉaj kaj eĉ pluroble pli nutraj ol viando. Ili havas grandan kvanton da proteino, plurajn mikroelementojn kaj vitaminojn. Ekz. enteno de proteino eĉ abelo estas 80%, tiu eĉ grilo — 76% kaj tiu eĉ formiko — pli ol 43%. 19 aminoacidoj kaj granda kvanto da zinko trovi-

LI SHENG:

Insektoj — manĝaĵoj en la estonteco

ĝas en formiko. Ĉiu kilogramo da formikoj entenas 220 miligramojn da zinko, dekoble pli multe ol tiu de sojfabo. Enteno de proteino eĉ akrido estas 50-75% kaj tiu de graso eĉ ĝi — 5-18%. Kaj krome akrido estas abunda je kalcio, fero, fosforo kaj vitaminoj A kaj B. Ankaŭ silk-raŭpa kokono estas riĉa je graso, vitaminoj kaj proteino.

Krom nutrovaloro de insektoj biologoj esploris ankaŭ ilian bredadon. Eksperimentoj pruvis, ke tio ne estas malfacila. Samkiel kokido, insektoj povas konverti pli ol 30% de siaj manĝaĵoj en korpopezon. Estas pli grave, ke insektoj prenas senvalorajn nutraĵojn kaj kreskas sur malvaloraj kampoj.

Fakte, antaŭ longe insektoj ser-

vis kiel manĝaĵoj de homoj, sed la homoj nun havas pli sciencan konon pri insektoj. Tial, por iuj manĝado de insektoj ne estas fremda. En multaj lokoj papilioj, termitoj kaj skaraboj servas kiel valoraj manĝaĵoj de longe. Oni diras, ke en la antikvaj Grekio kaj Romanio oni kolektis, sekigis kaj pulvorigis akridojn kaj bakis ilin en panon. Ie en Ameriko oni ŝatas frikositajn akridojn. En tropika regiono, kie abundas termitoj, oni elpremas oleon el ili. En diversaj lokoj de la mondo oni preparas manĝaĵojn el grandaj akvaj hemipteroj.


En Ĉinio oni faras ĉin-medicinaĵojn el insektoj. Ĉinoj ekfaris tonikaĵon el formikoj jam antaŭ jarmiloj.

Kredeble venos la tago, en kiu malgrandaj insektoj fariĝos nemankigeblaj manĝaĵoj. Tamen, por efike ekspluati tiun manĝaĵ-riĉfonton por la homaro, precipe la proteinan riĉfonton por la homaro, estas bezonata longperioda plano. Oni devos racie ekspluati de insektojn, por fari ilin pli nutroriĉaj kaj sanigaj kaj racie bredi kaj prilabori ili. Tio estos grava problemo por entomologoj. ■

Nova libro eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo

Bakin kaj Esperanto

(en la ĉina lingvo)



S-ro Bakin estas fama ĉina verkisto kaj tradukisto, kaj ankaŭ veterana esperantisto. Jam en sia juneco li komencis lerni Esperanton, redaktis Esperantajn periodaĵojn kaj fervore subtenis la Esperantan movadon. Li elesperantigis multajn verkojn de aliaj nacioj.

Tiu ĉi libro konsistas el tri partoj: verkaĵoj, tradukaĵoj kaj leteroj. Al la libro estas aldonitaj kronologiaj notoj pri aktivado de Bakin, kiuj estas valoraj por koni la rilatojn inter Bakin kaj Esperanto.

Formato: 14 X 22 cm. (broŝ.) 436 pĝ.

Prezo: 10.00 USD

Mendu ĉe Distribua Fako de EPC

Libroservo de UEA

EPC-peranto en via lando

Felo inkrustita per perlaĵoj

(Popolrakonto)

ESTIS mizera fraŭlo. Ĉiutage li faris kamplaboron sur montodeklivo. Pro lia malfeliĉo oni komponis kanzonon:

*Fraŭlo, fraŭlo,
sin kurbigas por dormado.
kun mentono sur genuoj,
kun kalkanoj sub gluteoj.*

Vintre li tiel dormis. Li parolis kun neniu. Nur lia ombro estis lia fidela akompananto. La vivo estis tre malfacila por li.

Tiun tagon li laboris surkampe. Laciĝinte, li pensis vespere preni vermiĉelojn kaj kapsikan supon por sin varmigi kaj frue endormiĝi. Reveninte hejmen, li rimarkis en la kaldrono vermiĉelojn kaj kapsikan supon, kiujn li deziris. En la sekvanta tago li pensis sur la montodeklivo pri manĝaĵo el vaporumita pasto. Post laboro li trovis tian manĝaĵon vaporantan en la kaldrono. De tiam, kion li deziris sur la montodeklivo, tion li vidis en la kaldrono. La afero iris tago post tago, kaj li neniel povis scii, kiu preparis la manĝaĵojn por li.

Foje li ŝajnis, ke li iris al kamplaboro. Fakte li kaŝis sin sur arbo antaŭ sia domo por rigardi, kio okazos. Tagmeze venis vulpo. Ruliĝinte tere antaŭ lia domo, ĝi demetis la felon kaj transformiĝis en belulinon. Ŝi tuj penetris en la domon tra fendo de la pordo, venis en la kuirejon, lavis al si la vizaĝon kaj manojn kaj ekpreparis manĝaĵon.

En tiu momento la fraŭlo descendis de la arbo kaj kaŝis la felon sub akvuĵon. Li abrupte malfermis la pordon, sin pafis en la domon kaj brakumis la vulpo-knabinon.

“Kiel bonkora vi estas!” li diris al ŝi. “Ĉiutage vi preparas manĝaĵon por mi sekrete. Mi ne lasos vin foriri hodiaŭ.”

Liberiĝinte sin de liaj brakoj, ŝi honteme kuris el la domo kaj serĉis sian felon, sed vane. Sen felo ŝi ne povis revulpiĝi nek reveni al monto. Tiel ŝi restis en lia domo kaj edziniĝis al li.

Poste ili havis bebon amindan kaj rideman, kiu multe plezurigis ilin. La viro ne plu sentis sin soleca

kaj ekĝuis la familian feliĉon.

Lia laborema edzino senlace faris mastrumadon tuttage. Tiuvespere ŝi lavis vestojn ĉe rivero. Hejme la bebo pli-ol-3-monata malsatiĝis kaj senĉese ploris kun fermitaj okuloj kaj malfermita buŝo. Tio metis la viron en embarason. Maltrankviliĝinte, li starigis la bebon sur siaj manplatoj, por ke ĝi ludu. Li zumis: “Mia kara, bone ludu kun mi, via patrino estas vulpospirito.”

En tiu momento lia edzino revenis. Aŭdinte, ke la edzo malkovris ŝian devenon, ŝi korŝire ploris kaj postulis, ke li redonu al ŝi la felon.

Ŝi insistis, kaj li pensis en si: “Eble la felo jam forputris sub la akvuĵo pro tempopaso. Do, ne gravas, ke ŝi retrovos ĝin.”

Je tio li diris al ŝi: “Ĝi estas sub la akvuĵo. Mem prenu ĝin.”

Ŝi prenis la felon el sub la akvuĵo, sed la felo, tute putra, fariĝis malgranda kiel monero. Ŝi plorante sternis ĝin sur sia genuo. Ŝiaj larmoj falis sur la felon kaj transformiĝis en perlojn, kiuj ŝtopis la truojn sur la felo kaj aldoniĝis al ĝia rando. Tiel la felo pli kaj pli grandiĝis. Momenton poste, tiu difektita felo fariĝis kompleta, brilanta en la suno.

Ŝi metis ĝin sur la dorson, ruliĝis tere, revulpiĝis kaj tuj forkuris al la monto sen returni la kapon. ■



EKONOMIO

● Pro sia granda loĝantaro Ĉinio ĉiutage konsumas multegajn vivbezonaĵojn, kvankam la pokapa konsumado de la ĉina popolo estas malalta. Ĉiutage en Ĉinio estas konsumitaj 60 milionoj da kg da porkoviando, 5 milionoj da kg da mangoleo kaj 750 milionoj da kg da greno kaj venditaj 60 000 televidiloj kaj 120 000 brakhorloĝoj.

Ĉiutage ĉ. 18 milionoj da pasaĝeroj prenas diversajn trafikilojn en Ĉinio.

● En 1995 la ĉinaj ter-malvirgigantaj laboristoj produktis entute 12.3 milionojn da tunoj da greno, je 1.51 milionoj da tunoj pli multe ol en 1994 kaj egale al 15% de la pliproduktita greno de la lando. En la jaro ili produktis 520 000 tunojn da kotono, kiuj egalas 14% de la totala kotona produktokvanto de Ĉinio.


● En la lasta jaro la ĉinaj nukle-elektrejoj donis elektron de 12.2 miliardoj da kWh. Inter ili Dayawan-a nuklea elektrejo en Guangdong-provinco donis 10 miliardojn da kWh kaj Qinshan-a nuklea elektrejo en Zhejiang (Ĝeĝjang)-provinco 2.2 miliardojn da kWh.

● En 1991-1995 la totala eksport-importa valoro de Ĉinio atingis 1 014.4 miliardojn da usonaj dolaroj, kun pliiĝo je 19.5% averaĝe por ĉiu jaro.

● Ĝis la fino de 1995, sume 258 903 entreprenoj investitaj de alilandanoj estis sankciitaj de la ĉina registaro kaj la uzita alilanda kapitalo estis 133.372 miliardoj da usonaj dolaroj. Kaj per tio Ĉinio fariĝis disvolviganta lando, kiu havas plej multe da alilanda kapitalo.

● La enlanda produktovaloro de la ekspluata distrikto Pudong de Ŝanhajo en 1995 atingis 41.2

En la ekspluata distrikto Pudong



miliardojn da juanoj kaj la monsumo investita de alilandaj entreprenistoj en la jaro 3.256 miliardojn da usonaj dolaroj. Nun en Pudong estas 3 501 entreprenoj, investitaj de aliaj landoj kaj regionoj, kun investitaj 9.141 miliardoj da usonaj dolaroj.

● La unua pasaĝer-aviadilo Boeing 777, importita de la Aviada Kompanio Nanfang de Ĉinio en la pasinta jaro, ekflugis inter Kantono kaj Pekino. Kaj per tio la kompanio fariĝis la 4-a en la mondo, kiu posedas aviadilon Boeing 777.

ARKEOLOGIO

● Ĉinaj zoologoj pri paleovertebruloj lastatempe sukcese reproduktis skeleton de kvaternara bubalo el Taiwan-markolo, kio refoje konfirmis, ke antaŭ 10 000 jaroj Taiwan-insulo kunligiĝis kun la ĉeftero de Ĉinio.

● Ĉinaj arkeologoj unuafoje malkovris ruinon de neolitika domego en formo de kavo en la Nordoriento de Ĉinio.

La pli-ol-6 500-jara kavo estas oblonga, areas almenaŭ 130 kvadratajn metrojn kaj profundas 1.5 m. Laŭ fakuloj, ĝi estis destinita por kunvenejo, kultejo kaj laborejo de klananoj aŭ tribanoj. Nun por la ĉinaj arkeologoj ankoraŭ estas enigmo kiel oni konstruis tiom grandan domskeleton siatempe.

● En malgranda interspaco inter malnovaj domoj de Hanzhong, Shaanxi (Ŝenŝji)-provinco, bone konserviĝas ekranmuro 14 m longa, 5 m alta kaj 1.2 m dika. Ĝi estis konstruita el verde kaj orflave glazuritaj tegoloj en Ming-dinastio (1368-1644). La muro surhavas glazuritajn florojn brilajn kaj versimilajn.

MEDICINO

● Ĝisdata statistiko montras, ke la sanstato de la ĉinaj infanoj multe pliboniĝas. Pli ol 80% de la infanoj senpage ricevis injektadon de vakcinoj kontraŭ bacilo Calmette-Guerin, mjelito, ostito, difterio, tetanoso, kokluŝo kaj morbilo.

● Gvidate de s-ro Mao Jiansen (Maŭ Ĝjansjen), prezidanto de la Zhejiang-a Medicina Akademio kaj membro de la Ĉina Akademio de Sciencoj, oni sukcesis provfari vivajn vakcinojn malmultigantajn viruson de hepatito A kaj komencis produkti ilin je 5 milionoj da dozoj jare. Unufoja injektado efikas por preventi la malsanon dum longa tempo.

SCIENCO KAJ TEKNIKO

● La Ĉina Akademio de Sciencoj kaj Tianjin-a Agronomia Akademio sukcesis en kuna esplorado de seksoregado de brutoj.

Fakuloj opinias, ke la sekso de brutoj rilatas rekte kun ĝia produktemo. Ekzemple, 60% de la idoj de

laktobovino estas virseksaj kaj ilia viand-produktemo estas malpli granda ol tiu de viandodikaj bovoj. Male, la viand-produktemo de virseksaj viandodikaj bovoj estas pli granda ol tiu de la inseksaj, sekve preferindas virseksaj idoj tiurasaj. Se oni povos regi la sekson de brutoj, do aperos epokfara impeto en bruta produktado.

- Post 15-jara penado laborantoj de la Nordokcidenta Agrikultura Universitato de Ĉinio sukcesis kulturi superpotencan hibridan printempan tritikon Serio 901, kun hektara produktokvanto de almenaŭ 9 000 kilogramoj. Tio markas mond-nivelan frukton de Ĉinio en esplorado de hibrida tritiko.



Tritika rikolto en familia kultivejo

MEDIPROTEKTO

- Nun pli ol 200 aziaj sovaĝaj elefantoj vivas en la primitivaj arbaroj en Xishuangbanna, Yunnan-provinco. Ĉar la loko alprenis rimedojn havigi al ili bonan vivmedion, ili ofte serĉas manĝaĵon ĉe rando de arbaro.

- Orientaj blankaj cikonioj, altaj kaj elegantaj, vivas ĉefe en Rusio, Japanio kaj norda Ĉinio. Post longtempa esplorado fakuloj de la Harbin-a Zoo, Ĉinio, unuafoje elkovis arte idojn de blanka cikonio, unuarange protektata de Ĉinio.

- En la pasintaj vintro kaj printempo denove kolektiĝis granda nombro da migrantaj birdoj en la naturparko ĉe Poyang-lago de Jiangxi (Ĝjangŝji)-provinco, Ĉinio.

Laŭ statistiko tie vivis 306 specoj da birdoj, kiaj gruoj blanka, griza kaj blankverta, sume 350 000. La parko estas la plej granda ripozejo de blankaj gruoj en la mondo.

KULTURO

- La libro "Katalogo de Ĉinaj Eldonaĵoj pri Tibe-


taj Studoj (1949-1991)" estas eldonita de la Fremdlingva Eldonejo de Ĉinio. Ĝi konigas librojn eldonitajn de proks. 200 eldonejoj en 1949-1991, kun 1 497 titoloj, kiuj temas pri la Tibeta Aŭtonoma Regiono kaj tibet-naciaj aŭtonomaj subprovincoj kaj gubernioj en aliaj provincoj, tibetaj kaj tibet-naciaj filozofio, religio, politiko, juro, ekonomio, eduko, parola kaj skriba lingvoj, literaturo, arto, historio, astronomio, geografio, medicino k.a.

La libro kun 1.1 milionoj da ideogramoj kaj koloraj ilustraĵoj estas han-, tibet- kaj angl-lingva kaj havas "Indekso" kaj "Referencaj Gazetoj kaj Ĵurnaloj pri Tibetaj Studoj" kiel apendicojn.

- Juna pentristo Feng Yugen kreis perblovan pentrarton. Unue li verŝas gutojn da tuĉo sur papecon, poste li blovas tuĉgutojn surbaze de sia elpensita projekto kaj samtempe per la manoj turnas la paperon por ĝustigi iradon de tuĉgutoj, ĝis pretiĝos la kreaĵo. Invitite, li trifoje vizitis Japanion. Liaj verkoj konserviĝas en pli ol 20 landoj kaj regionoj, kiaj Britio, Usono kaj Francio.

KURIOZAĴO

- Sur krutaĵo de Tongnan-gubernio, Sichuan-provinco, Ĉinio, etendiĝas pli ol 500-jara kornica vojo, 4 m larĝa kaj 36-ŝtupa. Ĝi tintas ĉe grimpado. Precipe 7 sinsekvaj ŝtupoj sonas kiel gamo el 7 malsamaj muziknotoj sur kordinstrumento. Laŭdire, sub la ŝtuparo fluas subtera rivereto. Ĉe grimpado aŭdiĝas kvazaŭ kordinstrumenta muzikaĵo



En naturparko ĉe Poyang-lago

pro resonanco de sonado de la ŝtuparo kaj lirlado de la rivero. Estas ankaŭ alia opinio, t.e. la loko estas proksima al Fujiang-rivero kaj kordinstrumenta muzikaĵo aŭdiĝas pro resonanco de paŝbruo de turistoj kaj lirilo de la rivero. La enigmo ankoraŭ ne estas solvita nun.

KIAM mi eniris en la oficejon de prof-ino Zhang Lizhu (Ĝang Liĝu), mi informiĝis, ke ŝi ĵus komisiis al flegistino telefoni al la hejmo de provtuba bebo de ŝi kulturita, pro ĝia naskiĝtago. Tial, tuj ĉe la intervidiĝo, prof-ino Zhang diris al mi: “Via alveno koincidas kun la unua datreveno de naskiĝo de nia unua provtuba bebo, kulturita per la frostigita-degeligita embria tekniko. La gepatroj de la bebo ĵus diris telefone, ke la infano kreskas sane.” Evidente, prof-ino Zhang ankoraŭ dronis en la emocio el tiu telefono.


Prof-ino Zhang mienas tenere kaj parolas milde. Tamen estas ŝi, kiu ne nur konatas kiel fama kuracistino de ginekologi-obstetriko, sed ankaŭ sukcesis kulturiti 122 provtubajn bebojn ekde 1988, pro tio ĉinoj nomas ŝin “patrino de la ĉinaj provtubaj beboj”.

En sia juneco Zhang Lizhu studis en la Pensilvania Universitato de Usono kaj doktoriĝis tie. Poste ŝi lernis en Britio kaj faris en Londono esploradon pri la fruaj diagnozo kaj kuraco de kanceraj kaj pri la ginekologi-obstetrika kliniko. En la somero de 1951 ŝi revenis al la patrolando kaj de tiam sin okupas pri la klinika esplorado de ginekologi-obstetriko. Do, nature nia konversacio komenciĝis ĉi-rilate.

Ŝi diris al mi, ke inter la nasko-aĝaj viroj kaj virinoj de Ĉinio, la suferantoj de sterileco konsistigas 2-6%. Sterileco kaŭzas al ili grandegan ĉagrenon, eĉ influas la geedzan amon kaj la familian harmonion. Pro tio prof-ino Zhang de longe serĉas efikan rimedon kontraŭ tiu malsano. En julio 1978 la unua provtuba bebo de la mondo naskiĝis en Britio. Poste la tekniko pri eksterkorpa fekundigo kaj embria transplantado rapide populariĝis tra la mondo. Informiĝinte pri tio, prof-ino Zhang tuj konsciis, ke tio ne nur povas helpi al la suferantoj de sterileco, sed ankaŭ estas grava paŝo de la homaro sur la vojo de vivo kaj scienco.

En 1984 prof-ino Zhang la unua starigis esploran grupon en la Pekina Medicina Universitato, kie ŝi laboras, kaj komencis laŭplanan esploradon. En 1986 ŝia esploro estis oficiale prenita kiel grava temo de la ŝtata medicina esplorado. Oni ankaŭ difinis la temon “Eŭgeniko-Esplorado pri la Protektado, Konservado kaj Evoluado de Fruaj Embrioj” kiel ion gravan kaj konkerindan, kaj fondis kunlaboran grupon estratan de la Pekina Medicina Universitato. Prof-ino Zhang eklaboris kiel teknika respondeculo de tiuflanke.

En la 10-a de marto 1988 prof-ino Zhang kaj ŝiaj gekolegoj finfine sukcesis post multfoja malsukceso: Naskiĝis la unua provtuba bebo de Ĉinio! Pri tiu momento ankoraŭ freŝas la memoro de prof-ino Zhang. Ŝi diris, ke la bebo estas ina. La patrino, vilaĝa instruistino, nomiĝas Zheng Guizhi (Ĝeng



Prof-ino Zhang Lizhu

Gujĝi). Kaŭze de obstrukco de ambaŭflankaj salpingoj, ŝi ne povis gravediĝi dum 20 jaroj post sia edziniĝo. Tiutage, kiam la bebo aŭdigis sian unuan ekploron en la operaciejo plena de streĉa atmosfero, Zheng Guizhi, brakumante sian filineton 3.5 kg pezan, larmis pro feliĉo. Antaŭ ĉi momento ŝi neniam pensis, ke ŝi, mezaĝulino, ankoraŭ povas fariĝi patrino.

Post la naskiĝo de la unua provtuba bebo, prof-ino Zhang, gvidante sian grupon, venkis teknikajn malfacilojn unu post alia. Ĝis nun ili jam plenumis 700-800 operaciojn por preni kaj planti ovulojn, altigis la klinikan gravedigan procentaĵon por provtuba bebo de 6.4% en 1988 al 28%. Krom uzi la teknikon de eksterkorpa fekundigo kaj embria transplantado, ili ankaŭ sukcesis en provado de “gameta ensalpinga transplantado”, “frostigita-degeligita embria provtuba bebo”, “gameto-donaco”, “embrio-donaco” k.a. kaj akiris ĝojgajn atingojn, tiel ke la esplorado de Ĉinio pri la genera medicino enviciĝis inter la tiuflanke avangardaj landoj.

La vortoj de prof-ino Zhang sentigis al mi, ke ŝia laboro estas mistera kaj sankta. Sed, kiam mi venis al ŝia laboratorio de provtubaj beboj, mi vidis tamen centpocentan simplecon: La oblonga ĉambro, kun areo de 30 kvadrataj metroj, dividiĝas en tri partojn per vitraj septoj, la ekstera parto servas kiel ambu-

“PATRINO DE LA ĈINAJ PROVTUBAJ BEBOJ”

de SUN AIJUN



Prof-ino Zhang Lizhu kaj de ŝi kulturita provtuba bebo

laborio, la meza kaj la interna kiel operaciejo kaj kulturejo desinfektitaj. Diversaj kuracaj instrumentoj establitaj en la ĉambro iom malvastigis ĝin.

Prof-ino Zhang diris sentoplene, ke la malgranda laboratorio kun ses kuracistoj altiris per sia avangarda tekniko malsanulojn el diversaj lokoj de la lando. Ofte okazis, ke pacientoj devis laŭvice atendi operacion. Por kontentigi grandegan bezonon de la socio, ŝi turnas la gravitan punkton de sia laboro al trejnado de junuloj, por ke pli multaj kuracistoj majstru tiun avangardan teknikon, kaj pli multaj suferantoj estu kuracitaj. Nun krom la laboratorio de prof-ino Zhang, ankaŭ iuj hospitaloj en la provincoj Hunan, Guangdong kaj Shandong kaj Ŝanhajo jam posedas kondiĉojn por la operacio.

Kulturi la novan vivon pere de moderna medicino sendube estas granda progreso de la homaro. Sed, ĉu tio ne estas kontraŭstara al la ĉina naskolimiga politiko kaj la tradicia morala kriterio de ĉinoj? Kvankam mi tre admiris prof-inon Zhang, tamen mi ne povis ne levi la demandon longe pripensitan.

Ŝi respondis malkaŝe: “La naskolimiga politiko de Ĉinio difinis, ke ĉiu geedza paro nasku unu infanon, kaj ne malpermesas infan-naskon. Tial, provtuba bebo ne kontraŭstaras al la naskolimiga politiko, male, tio ja estas bezono de eŭgeniko kaj genera

asekuro. Fakte estis en la socio diversaj miskomprenoj pri provtuba bebo kaj eĉ estiĝis psika premo al koncernatoj. Tamen, kun ĉiam pli profunda kono pri provtuba bebo, miskomprenoj certe malaperos iom post iom. Nun en Ĉinio oni principe uzas proprajn spermatozoojn kaj ovojn de pacientoj, kaj nur ĉe ekstreme speciala kazo oni uzas ‘gametodonacon’ aŭ ‘embrio-donacon’. Tio ne malobservas la tradician moralan kriterion, sed estas scienca praktikado de la homa genera medicino. En Ĉinio kaj en la tuta mondo oni devas ĝuste koni la signifon de ekzisto de provtuba bebo. Mi kredas, ke la vivo estas bela, kreado de la vivo des pli bela. Ĉiu homo ĝuu la rajton esti patrino aŭ patro, jen estas mia idealo.”

En ŝia agrabla parolado mi perceptis ian bravan obstinecon. Eble ĝuste kun tiu obstineco, kvankam maljuna, prof-ino Zhang ĝis nun ankoraŭ akurate atingas la hospitalon je la 8-a horo kaj duono ĉiun matenon, kontrolas malsanulajn ĉambrojn, faras operaciojn, direktas doktorajn kandidatojn, respondas al leteroj de malsanuloj... Ŝia kariero estas bela, ĝuste kiel ŝi diris. Por tiu bela kariero, ŝi brave kaj obstine strebadas, ĝis ŝi plene kunfandiĝos kun tiu beleco. ■

Masaĝo en la ĉiutaga vivo (XI)

KONTRAŬ DENTODOLORO

Dentoj doloras ĝenerale pro inflamoj ĉirkaŭ si, kiaj pulpito, peridentito kaj kario. Kaj krome, dentodoloron kaŭzas ankaŭ aliaj faktoroj. La unuaj estas: pirozo, hepata kaj galvezika brulumo kaj malvarmumo; kaj la duaj: senileco, febleco de la renoj kaj manko de likvaĵo en ili.

La dentodoloro kaŭzita de la unuaj faktoroj estas ofte akompanata de gingiva ŝveliĝo, mallakso, langa ruĝiĝo kaj flaviĝo de langa tegaĵo. Malvarma trinkaĵo povas mildigi la doloron. La dentodoloro kaŭzita de la lastaj estas ofte akompanata de denta ŝanceliĝo, sendormeco, gorga sekiĝo, langa ruĝiĝo kaj manko de langa tegaĵo. Varmeta trinkaĵo povas mildigi la doloron. La dentodoloro kaŭzita de pirozo atakas ofte en nokto, tiu de rena febleco ne estas akompanata de gingiva ŝveliĝo kaj ĝi okazas ĉefe en dentoradiko. Dentoj doloras infanojn ĉefe pro kario.

Masaĝu tiamaniere:

(1) Kontraŭ doloro de supraj dentoj: Per via dikfingro premknedu la akupunkturajn punktojn *zusanli*, *ĝjeŝji*, *nejting* (Bildo 2), *ŝanggŭan*, *ŝjagŭan*, *tinggong* kaj *dicang* (Bildo 1) sur la dentodolora flanko de la




korpo kaj la akupunkturajn punkton *hegu* (Bildo 3) sur la sana flanko de la korpo. Premknedu ĉiun punkton duonminuton.

(2) Kontraŭ doloro de malsupraj dentoj: Premknedu la akupunkturajn punktojn *hegu*, *erĝjan* kaj *sanĝjan* sur la sana flanko de la korpo (Bildo 3) kaj *ĝjaĉe*, *dajing* (Bildo 1) sur la dentodolora flanko de la korpo.

(3) Kontraŭ dentodoloro kaŭzita pro rena febleco: Prem-puŝu per via dikfingro de sube supren la akupunkturajn punktojn *tajŝji*, *fuliŭ* kaj *sanjingjaŭ* (Bildo 4).

(4) Kontraŭ dentodoloro kaŭzita pro kario: Masaĝu per la supre diritaj manieroj, kaj plie, kuracu la karion en hospitalo.

(5) Kontraŭ akuta dentodoloro: Forte prem-puŝu en direkto al la fingroj la akupunkturajn punkton *hegu* 1-2 minutojn. Masaĝu ĝin sur la maldekstra mano, se vin doloras dekstraj dentoj, kaj masaĝu ĝin sur la dekstra, se vin doloras la maldekstraj.



Pri la transskribo de ĉinaj personaj kaj lokaj nomoj

Kvankam en Ĉinio estas la unuigitaj ĉinaj ideogramoj, tamen pro la teritoria vasteco la prononco de la samaj ideogramoj estas multe diferenca en malsamaj lokoj. Por unuigi la prononcon, faciligi komunikadon kaj interŝanĝon, la ĉina registaro el-laboris projekton por la ĉina fonetika alfabeto, kiu nun estas uzata ne nur en Ĉinio, sed ankaŭ en la mondo. Ĝi estas norma transskriba sistemo por ĉinaj personaj kaj lokaj nomoj.

Tamen uzado de la ĉina fonetika alfabeto portis ankaŭ ian malfacilon por niaj legantoj, kiuj ne konas han-lingvon, alinome la ĉinan lingvon. Iuj el niaj legantoj skribis al ni kun propono transskribi ĉinajn personajn kaj lokajn nomojn per Esperantaj literoj. Ankaŭ nia redakcio donis grandan atenton al tiu problemo kaj faris provadon. De majo 1984 nia revuo per Esperantaj literoj transskribis la ĉinajn personajn kaj lokajn nomojn, kio unuflanke faciligis al niaj legantoj la legadon kaj aliflanke portis al ili ian konfuzon kaj miskomprenon. Ĉar la Esperantaj fonemoj multe diferencas de la han-lingvaj, absolute neblas precize esperantigi la ĉinajn personajn kaj lokajn nomojn kaj la skriboj de la esperantigitaj ĉinaj personajn kaj lokajn nomojn estas diferencaj de tiuj ĝenerale uzataj internacie.

Por solvi tiun problemon ni decidis, ekde 1989, denove uzi la ĉinan fonetikan alfabeton en transskribo de ĉinaj personaj kaj lokaj nomoj kaj metis la Esperantaj literojn en krampoj post la koncernaj nomoj, kiam ili unuafoje aperis en la artikolo. De 1990 ni forigis la krampojn. Petate de niaj legantoj ekde la januara numero, 1996, ni denove alprenis la krampojn. Por ke niaj legantoj konu la ĉinan fonetikon, ni konigos ĝiajn regulojn kaj regule konigos la tabelon por kompari la ĉinan fonetikon kun la Esperanta.

Efektive la ĉina fonetika alfabeto ne estas komplikata. Ĝi havas 26 latinajn literojn. Tiuj literoj kaj literkombinoj povas dividiĝi en 2 partojn, t.e. konsonantojn kaj vokalojn. Ĉiu ĉina ideogramo prononciĝas per vokalo aŭ konsonanto kaj vokalo kune. En la alfabeto estas entute 21 konsonantoj kaj konsonant-kombinoj: b p m f d t n l g k h j q x zh ch sh r z c kaj s, kaj 35 vokaloj kaj vokal-kombinoj: i e a u o ŭ ie ia ua uo ŭe ei ai ao ou iao iou uei uai

in en an un ian uen ŭan ing eng ang ong iang iong ueng kaj uang. El tio oni vidas, ke ankaŭ en la ĉina lingvo la vokaloj estas ĉefaj sonoj kaj la silaboj estas kompare fiksjaj. La supre diritaj 21 konsonantoj kaj 35 vokaloj en la kombino observas certajn regulojn. Iliaj kombinoj estas malpli ol 400, alivorte, se oni bone posedas la supre diritajn literojn kaj iliajn kombinojn, do estos ne malfacile prononci ĉiujn vortojn.

Sube ni listigis vokalojn kaj konsonantojn en la ĉina fenetika alfabeto, kiuj estas malfacile posedeblaj, kaj komparas iliajn prononcojn kun Esperantaj:

j=ĝj q=ĉj x=ŝj zh=ĝ ch=ĉ sh=ŝ r=ĵ ŭ=ju ie=je ia=ja ua=ŭa uo=ŭo ŭe=jŭe ei=ej ai=aj ao=aŭ ou=oŭ iao=jaŭ iou=jou uei=ŭej uai=ŭaj ian=jan uen=ŭen ŭan=ŭan ŭan=jŭan iang=jang iong=jong ueng=ŭeng uang=ŭang

Estas menciinde, ke

A. La supre diritaj Esperantaj prononcoj estas nur proksimumaj, sed ne precizaj.


B. En la ĉina lingvo kvankam kelkaj vokal-kombinoj konsistas el 2 aŭ 3 vokaloj, tamen ili restas unu silabo, kiu devas esti rigardata kiel unu tuto. El tiuj vokal-kombinoj nur unu vokala litero devas esti akcentita, dum la ceteraj funkcias kiel duonvokaloj, ekz. i estas prononcata kiel j kaj u kiel ŭ. La zorgema studo de la supra komparo konigas, kiuj el ili estas akcentitaj kaj kiuj ne.

C. La vokalaj kombinoj kun konsonanta litero ne estas facile prononceblaj. En ang eng ong iang ing iong uang ueng, la ng estas prononcata kiel n, sed ne n+g, ekz. ang devas esti prononcata kiel an kaj ueng kiel ŭen.

Ĉ. Kvankam en la konsonantaj tabeloj ne troviĝas y kaj w, tamen ofte vidiĝas substantivoj kun y kaj w, ĉar inter la 35 vokaloj kaj vokal-kombinoj estas 10, kies unua litero estas i, nome, i ia ie iao iou ian in iang ing kaj iong, laŭ la regulo en la skribado antaŭ i, in kaj ing oni devas aldoni y kaj en la skribado de aliaj 7 vokalaj kombinoj oni devas anstataŭigi i per y, t.e. yi ya ye yao you yan yin yang ying kaj yong. Same, se antaŭ u ne troviĝas konsonanto, oni devas aldoni w antaŭ u en la skribado, t.e. u devas esti skribita kiel wu, kaj anstataŭigi u per w, ekz. ua uo uai uei uan uen uang kaj ueng devas esti skribitaj kiel wa wo wai wei wan wen wang kaj weng respektive. Tiamaniere, kvankam la skribado estas ŝanĝita, tamen la prononcado restas sama, ĉar y prononciĝas same kiel j, kaj w kiel u.

D. La prononco de la konsonantoj kaj vokaloj estas sama kiel tiuj en Esperanto. Oni devas prononci ilin kune.

La Red.



Nova libro eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo

Verkoj de Ĵelezo

(en la ĉina lingvo)

S-ro Ĵelezo estis eminenta gvidanto de la ĉina Esperanta movado kaj unu el la ĉefaj respondeculoj de la Ĉina Ŝtata Komisiono pri Lingvaj Aferoj.

La libro entenas dekojn da disertaĵoj, memornotoj kaj leteroj pri Esperanta movado kaj reformado de la ĉina skriba lingvo, kiujn li skribis kaj tradukis ekde la 30-aj jaroj. Ili estas ne nur valoraj disertaĵoj, sed ankaŭ gravaj historiaj materialoj. Al la libro aldoniĝis suplementoj, en kiuj troviĝas liaj biografio kaj kronologia tabelo, kaj memorigaj artikoloj, kiuj en malsamaj flankoj prezentas liajn meritojn kaj bonajn kvalitojn.

Formato: 14 x 22 cm (broŝ.) 500 pĝ.

Prezo: 12.00 USD

Mendu ĉe: Distribua Fako de EPC
Libroservo de UEA
Nia peranto en via lando


GALERIO

PENTRAĴO "ĈEVALOJ"

de RUAN HAIYING

La pentraĵo "Ĉevaloj" farita de Zhao Mengfu, fama pentristo de Yuan-dinastio (1279-1368), bildigas bredistojn kaj iliajn ĉevalojn, ripozantajn en la pitoreska antaŭurbo. En la pentraĵo vidiĝas 14 fortaj ĉevaloj kun haroj nigraj, blankaj, grizaj, brunaj kaj makulaj, kiuj, starante en rivero aŭ ĉe bordo, trinkas akvon aŭ manĝas herbojn, kuŝas, henas aŭ rigardas kun levita kapo. Inter la ĉevalbredistoj iuj banas sian ĉevalon, aliaj rajdas surĉevalo laŭ bordo kaj triaj kviete sin refreŝigas. La diversaj figuroj, movaj kaj senmovaj, estas bone prezentataj kaj impresas reliefe. Tio montras la altan teknikon de la aŭtoro. Krome, la belaj strioj kaj densaj koloroj akre kontrastigas la sunlumon kun la klara fluo kaj ombro de arboj.

La aŭtoro estis posteulo de la imperiestra familio de la Suda Song-dinastio (1127-1279) kaj poste fariĝis ŝtatoficisto de Yuan-dinastio. La pentraĵo montras lian grandan talenton kaj lian novan eminentan stilon.



La Granda Muro en nokto

Foto de LIU YINGHU

ISSN 0032-4361



9 770032 436009

世界语 《中国报道》 一九九六年第六期

(本刊代号:二—九一五) 国内统一刊号:CN11 1339/G2

